

# EL ĈINA POEZIO

**Esperantigis S. J. Zee**

**EL POPOLA ĈINIO**

**e-Librigita de ELERNO**

**majo, 2006**

## RIMARKO DE LA ELDONINTO

S. J. Zee, la plej ŝatata poeto Esperanta en nia lando, estas sufiĉe konata eksterlande pro liaj originalaj kaj tradukaj poemoj aperigitaj en la Literatura Mondo (dua periodo). Liaj multaj tradukoj el ĉina poezio restis en manuskriptoj, kiujn konservis k-do Tikos por eventuala eldonado en libroformo. En 1977, k-do Tikos aperigis ilin mimeografe en unu volumo en tre limigita eldonkvanto, el kiu nur kelkaj ekzempleroj iris eksterlanden.

La enhavo de la nuna volumo estas en pli konvena tipografia vesto. Krome estas nove enmetita artikolo pri la ĉina klasika poezio, speciale verkita de k-do Zee por tiu eldono. Espereble, tiu artikolo iom helpas la legantojn ekkoni ĉinan poezion, kiu havas tradicion de miloj da jaroj kaj meritas priatenton de alilandaj poezi-amantoj. Ni kore dankas la tradukinton pro lia valora kontribuo al nia Esperanta literaturo. Ni dankas ankaŭ k-don Tikos pro lia zorgema kolektado kaj konservado de tiuj tradukaĵoj.



Prof. Saint Jules Zee (1902-) estas elstara kaj diligenta tradukanto el ĉinaj esperantistoj. Li debutis en la tridekaj jaroj kontribuante al la tiama “Literatura Mondo” per sia tradukaĵoj el ĉina poezio kaj originalaj poemoj, el kiuj kelkajn pecojn oni povas trovi en “Esperanta Antologio” kompilita de W. Auld.

Post la Liberiĝo de Ĉinio el lia plumo aperies la poemaro “La Plej Forta Voĉo de la Paco” kaj du novel-kolektoj “Por Nova Afero Nova Maniero” kaj “La Feliĉo”, el kiuj la plejparto estas liaj tradukoj. Li kunlaboris ankaŭ al la “Ĉina Antologio 1949-1959”, kies tuta poezia parto estas el lia kontribuo. Krome li tradukis parton de “Noveloj de Lusin” kaj reviziis la tutan libron (la unuan eldonon).

La nuna kolekto estas lia alia kontribuo, el kiu la legantoj ĝuos ĉinan poezion almenaŭ specimene el la periodoj kaj antikva kaj moderna.

# KELKAJ VORTOJ PRI LA ĈINA

## KLASIKA POEZIO

Riĉega estas la trezoro de ĉina klasika poezio kaj tre longa ĝia historio. Neniu povas diri precize, kiam ĝi komenciĝis. Ekzistas ja poemoj atribuitaj al la epoko de la antikvaj suverenoj Yao kaj Shun<sup>1</sup> (2357-2207a.K.), sed ili unuafoje aperis en multe pli malfruaj libroj kaj la aŭtentikeco estas dubinda. Se *La Kanto de la Kvin Regidoj*, kiu troviĝas en nia plej antikva skriba historio Shujing<sup>2</sup> (*La Libro de Antikva Historio*), estas aŭtentika, la ĉina poezio datiĝis jam de pli ol kvardek jarcentoj, ĉar tiu historia evento okazis laŭdire ĉe la komenco de la dudek-dua jarcento a.K., sed ĉio ĉi tio restas ankoraŭ en legenda nebulo kaj mankas al ni pruvo sufiĉe fidinda.

La unua ampleksa kolekto de antikvaj poemoj estas Shijing<sup>3</sup> (*La Libro de Poezio*), kiu kompiliĝis antaŭ la tempo de Konfucio kaj la nunan definitivan redakcion ni ŝuldas al li. Ekde tiam la libro estas vaste legata de ĉinaj kleruloj de ĉiuj generacioj kaj la poetoj de la pasinteco senescepte ĝin rigardis kiel la plej altan modelon de poezio kaj lernis de ĝi la arton de versverkado. La libro konsistas el 305 poemoj, kiuj dividiĝis en tri grupojn: 1. “*Feng*”, lirikoj el dek kvin vasallandoj; 2. “*Ya*”, politikaj kaj didaktikaj poemoj; kaj 3. “*Song*”, danckantoj por diversaj ritoj. Ili formiĝis el kvarsilabaj versoj. Ĉiu poemo, escepte de parto el “*Song*”-grupo, dividiĝis en egal- aŭ neegallongajn stancojn.

La modernajn legantojn plej interesas la lirikaj poemoj el la unua grupo. La poetoj kantis pri sia ĝojo aŭ ĉagreno, amo al la bono kaj belo, indigno kontraŭ la abomenaĵoj kaj maljustaĵoj el la tuta koro, ni kvazaŭ aŭdas iliajn korbatojn. La tre simpla, preskaŭ naiva stilo kun tia senornama beleco nin mirigas, dum la pli longaj poemoj kun pli seriozaj temoj de la “*Ya*”-parto estas plenaj de profunda saĝo kaj en trankvila majesta maniero. Ĉiuj tiuj verkoj el la 11-a ĝis la 6-a jarcentoj a.K. ĉiam vekas grandan admiron de la legantoj nuntempaj kaj ilia freŝa brilo neniel paliĝis post ĉirkaŭ dudek kvin jarcentoj.

Escepte de tre malmultaj poemoj, kie la verkintoj malkovris sian personon, la tuta kolekto apartenis al anonimaj aŭtoroj. En tiu florado de ĉina poezio oni ne povas citi iun ajn konatan poeton. La unua granda ĉina poeto estas Qu Yuan<sup>4</sup> (340-278 a.K.), kortegano kaj parenco de la reĝa familio de Chu<sup>5</sup>-lando. Li vidis la korupton kaj senzorgon de la kortego antaŭ la minacanta invado de la potenca najbaro, Qin<sup>6</sup>-lando, kaj donis ripetfoje admonojn kaj konsilojn al la reĝo por tiun atentigi pri la kriza situacio de la regno. Sed la reĝo ne

---

1. Elparolu Yao kiel *jaŭ* kaj Shun kiel *ŝun*.

2. Shujing (elparolu *ŝuĝing*)

3. Shijing (*ŝiĝing*)

4. Qu Yuan (*ĉju jŭan*)

5. Chu (*ĉu*)

6. Qin (*ĉin*)

aŭskultis, male tre koleris pro liaj ripetitaj admonoj kaj ekzilis lin al la sudo. Li tre malĝojis kaj malesperante dronigis sin en Miluo<sup>7</sup>-rivero. Li verkis multe dum ekzilado por esprimi siajn malĝojon kaj maltrankvilon por la patrujo, nome: *Li-sao* (*Disiĝa Malĝojo*), *Naŭ Ĉapitroj*, *Naŭ Kantoj*, *Demandoj al la Ĉielo*, *Longa Vojaĝo*, *Revoko al la Vaganta Animo* ktp. Tiuj poemoj malfermis tute novan epokon por la ĉina poezio. Lia varma patriotisma emocio bolas sub la kovro de riĉe ornamita alegorio kaj senbrida vaganta fantazio.

Lia ĉefverko *Li-sao*, 374-versa poemo, kiel liaj ceteraj verkoj, estas plena de mitaj kaj historiaj aludoj. Ankaŭ en la formo ĝi diferencas de la poemoj de *Shijing*. Ĝi formiĝis ĝenerale de sessilabaj versoj kun rimo de ĉiu parnombra verso kaj sensignifa vorto “*yi*” ĉe la fino de neparnombra por plilongigi la sonon de la lasta vorto kaj fari paŭzeton inter la du versoj. Kompreneble la silabnombro de la verso ne estas ĉie egala. En la *Naŭ Kantoj* la versoj estas ĝenerale kvarsilabaj kun okazaj esceptoj, kaj oni metis la vorton “*yi*” en la mezon de ĉiu verso. Tiu ĉi versformo kun la vorto “*yi*” inter du versoj aŭ en la mezo de ĉiu verso estis vaste uzata dum la Okcidenta Han-dinastio (206 a.K.—24 p.K.). Ĉar ĝi devenis de Chu-lando, oni nomis ĝin stilo de *Chuci* (Chu-poemoj).

La imperiestro Han Wudi (140—88 a.K.) fondis ŝtatan muzikan instituton kaj dissendis senditojn por

---

7. Miluo (*milŭo*)

kolekti popolkantojn el diversaj regionoj por ilin adapti al muziko. La konservitaj tekstoj de tiaj kantoj ne ĉiuj estas el tiu tempo. Multaj versajne apartenas al pli malfrua dato. Iliaj versformoj estas tre diversaj, sed la kvinsilaba verso okupas la ĉefan lokon. Iom post iom ankaŭ la literaturistoj adoptis tiun formon kaj ĝi baldaŭ anstataŭis la elmodiĝintajn kvarsilabajn de *Shijing* kaj la sessilabajn de *Chuci*. Dum la Orienta Han-dinastio (25-219) tiu ĉi formo jam atingis altan perfektecon kaj kelkaj el la tiamaj popolkantoj kaj la anonimaj *Dek Naŭ Poemoj* estas veraj gemoj de ĉina literaturo. De tiam la kvinsilaba verso fariĝis la ĉefa versformo de ĉina klasika poezio.

Antaŭ la tria jarcento ni trovas neniun, kiu dediĉis sin al la poezio. La restantaj poemoj ĝenerale estis okazaj produktaĵoj. La grava historia figuro Cao Cao (155-220) estis samtempe unuaranga poeto kaj verkis dekojn da poemoj, kiujn la posteuloj estimis tre alte. Liaj du filoj, Cao Pi (187-226), la unua reĝo de Wei-dinastio, kaj Cao Zhi (192-232)<sup>8</sup>, ambaŭ estis geniaj verkistoj, precipe la lasta, kiu verkis grandan kvanton da belegaj poemoj kaj prozaĵoj. Oni preskaŭ unuavoĉe nomis lin la princo de poezio. Ili grupiĝis ĉirkaŭ si aron da literaturaj talentuloj. La “plejadon de la epoko de Jian-an”<sup>9</sup> (196-219)” tre bone konas ĉiuj lernantoj de la historio de la ĉina literaturo.

---

8. Cao Zhi (*caŭ ĝi*)

9. Jian-an (*ĝjan-an*)

De la tria ĝis la sesa jarcento, la ĉina popolo travivis longdaŭran malordon, pro senĉesa intermilito kaj ofta ŝanĝiĝo de dinastioj. La plejparto de aristokrataj kleruloj vivis en malesperiga stato. Tre abundis en tiu epoko poetoj kaj poemkolektoj, sed krom malmultaj esceptoj, la stilo estas multe ornamita kaj la enhavo tute frivola. Tao Qian<sup>10</sup> unusola, kantante pri siaj simpla vivo kaj nobla penso kun tute natura kaj senornama stilo, montris sin tre altkvalita poeto. Post li, Bao Zhao<sup>11</sup> estis tre brila talentulo. Aperis ankaŭ deko da menciindaj poetoj, sed neniu povas kompari kun tiuj du. Dume abundegis en tiu tempo belaj popolkantoj. Tiuj de la sudo ĝenerale temis pri amoro, dum la nordaj spegulis la vivon de la kuraĝaj nomadoj. Ni trovas inter ili multe da etaj gemoj de nia poezio.

La kvinilaba verso estis la reganta versformo de tiu epoko, sed la sepsilaba jam ekĝermis en Han-dinastio kaj iom post iom disvolviĝis. Kvankam ni trovas sennombrajn tre melodiajn poemojn antaŭ tiu tempo, tamenne ekzistis ankoraŭ fiksita regularo de metriko. Ĝin unuafoje proponis la fama poeto kaj historiisto Shen Yue<sup>12</sup> (441-513) kaj perfektigis en praktikado la Tang-dinastiaj kortegaj poetoj Shen Quanqi kaj Song Zhi-wen<sup>13</sup> en la malfrua parto de la 7-a jarcento. De tiam la ĉefaj versformoj de ĉina klasika poezio estis la

---

10. Tao Qian (*taŭ ĉjan*)

11. Bao Zhao (*baŭ ĝaŭ*)

12. Shen Yue (*ŝen jŭe*)



kvinsilabaj kaj sepsilabaj versoj en malnova maniero (senfiksitaj metrikaj reguloj) aŭ en nova maniero (kunfiksitaj reguloj).

Tang-dinastio (618-905) vidis la plenfloradon de nia poezio. Ĝi estis senprecedenca kaj kvante kaj kvalite. Tiom da brilaj steloj aperis sur la poezia ĉielo, sed super ĉiuj brilis blindige du plej grandaj astroj, Li Bai (701-762) kaj Du Fu (712-770). Oni nomis Li feo de poezio kaj Du sanktulo de poezio. La mirindaj poemoj de Li impresas nin kvazaŭ supernatura kreitaĵo. Lia flugila penso levis sin ĝis la ĉielo kvazaŭ neniam tuŝante la teron. Ĉio fluis el sub lia plumo tiel neatendite sed spontanee. Dume Du Fu ĉiam staris sur la firma tero. Li vivis inter la popolamaso, sentis kaj suferis kune kun ili. Lia verkaro spegulis la tutan epokon kaj la tutan societeton, tial oni nomis lin poeto-historiisto. Li nutris sin per la tuta heredita poezia kulturo, sed ĉion li kunfandis kaj transformis sub sia plumo. Per la diverseco de stilo kaj la amplekso de enhavo, li superis ĉiujn antaŭajn kaj postajn poetojn. Li estas unika en la historio de la ĉina poezio. Tiuj du poetoj estas tiel grandaj, ke malfacilas diri, kiu estas la pli granda. Ni nur povas diri: Li Bai estas la poeto de poetoj kaj Du Fu la poeto de la popolo. Li Bai ni admiras, dum Du Fu ni amas. Jen la kulmino de la ĉina klasika poezio kaj la postaj jam ne atingis tiun altan nivelon.

---

13. Shen Quanqi (*ŝen ĉŭanĉji*), Song Zhiwen (*song ĝi-ŭen*)

La poetoj de Song-dinastio (960-1270) grandparte verkis sub la influo de Du Fu kaj aperis kelkaj grandaj talentuloj, inter kiuj la plej rimarkindaj estis Su Shi<sup>14</sup> aŭ Su Dongpo (1037-1101) kaj Lu You aŭ Lu Fangweng (1125-1210) .

La poezio kun la supre menciitaj versformoj jam evoluis ĝis la lasta limo. Kvankam ĝi daŭris ankoraŭ tre longe, eĉ hodiaŭ oni ofte verkas en tiuj formoj kaj dum la lastaj sep jarcentoj aperis multe da eminentaj poetoj, tamen troviĝis jam nenio nova.

Du apartaj branĉoj de poezio sekvis. Dum la malfrua duono de Tang-dinastio ekestiĝis nova formo de poezio, nomata “Ci”, kiu plenfloradis dum Song-dinastio kaj fariĝis la reganta poezia formo de tiu epoko. Ankaŭ troviĝas multaj majstroj de ĉi tiu speco de poemoj. Ĝi unue estis adaptita al muziko kaj kantita de kantistinoj aŭ dancistinoj. Ekzistis por ĝi centoj da apartaj arioj. Por ĉiu aparta ario estis fiksita versformo, t.e. kun fiksita nombro da versoj neegallongaj kaj fiksita nombro da silaboj por ĉiu verso. Ĉiu aparta ario havas sian specialan ritm- kaj rim-aranĝon: Eĉ tre eta malprecizeco malebligis la kantadon. Sed iom post iom iuj arioj elmodiĝis kaj iliaj melodioj baldaŭ estis forgesitaj. Fine tiu branĉo de poezio tute liberiĝis de la muziko kaj restis al ĝi nur la aparta versformo kaj ĝi funkciis same kiel la kvinsilabaj kaj sepsilabaj versoj.

La alia branĉo estas “Qu”<sup>15</sup>, kiu aperis post “Ci”

---

14. Su Shi (*su ŝi*)

kaj floradis en Yuan- (277-1367), Ming- (1368-1643) kaj la unua duono de Qing<sup>16</sup>- (1644-1911) dinastioj. Ankaŭ ĝi estis adaptita al muziko kaj uzata ĉefe por versdramoj. La Yuan-dramoj ĝenerale konsistis el kvar aktoj kun prologo aŭ intermezoj inter la aktoj. Restas al ni multe da ĉefverkoj el tiaj dramoj. La plej konata kaj plej longa estas *La Okcidenta Ĉambro*, kiu dividiĝis en dudek aktojn, reale kvin dramoj kunligitaj. La versdramoj de Ming- kaj Qing-dinastioj estas multe pli longaj, kelkaj eĉ superis kvindek aktojn. La plej famaj: *Peonia Pavilono* de Tang Xianzu<sup>17</sup>, *Longviva Palaco-salonego* de Hong Sheng<sup>18</sup> kaj *Persikflora Ventumilo* de Kong Shangren<sup>19</sup> estas vere grandaj ĉefverkoj en belegaj versoj.

Ni ne posedas epopeojn kiel *Iliadon* aŭ *Eneidon*. Niaj vers-rakontoj limiĝis je kelkdeko da versoj. La plej longa kaj bona el ili, *La Pavo Fbugas Sudorienten*, (ĉe la komenco de la tria jarcento), nombras nur 357 versojn. Tamen dum la 16-a — 18-a jarcentoj aperis multe da vers-romanoj, kiujn profesiaj rakontistoj kantis al la publiko je la akompano de kord-muzikilo. Ili temis ĝenerale pri amaventuro inter talentaj gejunuloj kaj estis vaste ŝatataj, speciale de virinoj. Sed ilia stilo estis

---

15. Qu (*ĉju*)

16. Qing (*ĉing*)

17. Tang Xianzu (*tang ŝjanzu*)

18. Hong Sheng (*hong ŝeng*)

19. Kong Shangren (*kong ŝangĝen*)

malkompakta kaj iom vulgara laŭ la gusto de la amaso, nur malmulte el ili atingis la nivelon de serioza literaturo.

Jen la tre rapida skizo pri la ĉina klasika poezio. Mi ankoraŭ volas paroli iomete pri ĝiaj ordinaraj temoj. Diference de la okcidenta poezio, la universalaj temoj: Dio, amo kaj milito ne okupis tiom gravan lokon en ĉina klasika poezio. Ĉinoj ne estas religiema popolo. Ilin multe pli interesis la homa mondo ol la supernatural Dia volo. La saĝulo Konfucio diris: “La ĉiela vojo estas malproksima; la homa vojo estas proksima.” La antikvaj ĉinoj kultis la ĉielon kaj la aliajn naturajn fortojn. Sed en ilia imago, la ĉiela suvereno neniel similis al la greka Zeŭso aŭ la kristana Jehovo. Li estis tre abstrakta, reprezentante nur ian superan moralan forton. Poste budhismo venis el Hindujo kaj sukcesis varbi multe da adeptoj, sed por la plejparto de la kleruloj ĝi restis nur filozofia doktrino, kiu influis la vivosintenadon de parto de la poetoj. En iliaj verkoj nenia fervoro religia speguliĝis, kiel kristanismo por la okcidentaj poetoj.

Ĉinaj klasikaj poetoj kantis ankaŭ amon, sed ĝia signifo estis pli vasta. Ili pli ofte kantis pri la amo al la gepatroj, la amo inter la geedzoj, gefratoj, amikoj, frathomaj ktp. Amorajn poemojn ni havas, speciale inter la popolkantoj, sed ili ne okupis tian gravan lokon kiel en la okcidenta poezio.

Pri milito, la sintenado de ĉinaj klasikaj poetoj estis kritika, ili senescepte severe riproĉis ĉiajn ekspanziismajn militojn, kiuj nepre portas katastrofojn al

la popolo. Ili gloris nur la heroojn de la kontraŭinvadaj militoj. Tial la bildo de militoj en nia poezio estis ĝenerale tre malhela kaj terura.

Niaj poetoj amas la naturon, la homojn, noblajn agojn kaj pensojn. La ĉefa karaktero de la ĉina klasika poezio estas ĝia humaneco.

La metriko de ĉina klasika poezio havas ankaŭ siajn apartaĵojn. Mi jam diris supre: por la poemoj en malnova maniero ne ekzistas fiksitaj reguloj pri la ritmo-aranĝo. La melodio dependas de la lerta manipulado de la poeto, kio estas afero intuicia. Reguloj ekzistas nur por la poemoj en nova maniero. Teorie, same kiel la metriko de la okcidenta poezio, ĝi baziĝas principe sur la alternadoj de fortaj kaj malfortaj sonoj. Sed diferencas en tio: la metrika unuo de ĉina poezio ne estas silabo, sed piedo, do fortaj kaj malfortaj piedoj alternas. Du silaboj faras piedon, la forta piedo konsistas el du fortaj silaboj kaj la malforta piedo: du malfortaj. Ĉar la versoj de la ĉinaj klasikaj poemoj estas aŭ kvinsilabaj aŭ sepsilabaj, unu el la tri aŭ kvar piedoj devas esti unusilaba, dum legado oni faras paŭzeton post tiu silabo aŭ iom longigas ĝin. Laŭforme troviĝas nur du specoj de poemoj en la nova maniero, tio estas, versokvaro kaj versoko. La ritmoaranĝon de tiuj versformoj mi montras per la sekvantaj diagramoj:

I. Versokvaro komenciĝanta per malforta piedo:

a.    ~ ~ | ~ ... | - - ||  
       - - | ~ ~ | - ... ||  
       - - | - ... | ~ ~ ||  
       ~ ~ | ~ ... | - - ||

b.    ~ ~ | - - | ~ ~ | - ... ||  
       - - | ~ ~ | ~ ... | - - ||  
       - - | ~ ~ | - - | ~ ... ||  
       ~ ~ | - - | ~ ~ | - ... ||

II. Versokvaro komenciganta per forta piedo:

a.    - - | ~ ~ | - ... ||  
       ~ ~ | ~ ... | - - ||  
       ~ ~ | - - | ~ ... ||  
       - - | ~ ~ | - ... ||

b.    - - | ~ ~ | - ... | - - ||  
       ~ ~ | - - | ~ ~ | - - - ||  
       ~ ~ | - - | ~ ... | ~ ~ ||  
       - - | ~ ~ | ~ ... | - - ||

III Versoko komenciganta per malforta piedo:

a.    ~ ~ | ~ ... | - - ||  
       - - | ~ ~ | - ... ||  
       - - | - ... | ~ ~ ||  
       ~ ~ | ~ ... | - - ||  
       ~ ~ | - - | ~ ... ||  
       - - | ~ ~ | - ... ||  
       - - | - ... | ~ ~ ||  
       ~ ~ | ~ ... | - - ||

b.    ~ ~ | - - | ~ ~ | - ... ||

- - | ~ ~ | ~ ... | - - ||  
 - - | ~ ~ | - - | ~ ... ||  
 ~ ~ | - - | ~ ~ | - ... ||  
 ~ ~ | - - | - ... | ~ ~ ||  
 - - | ~ ~ | ~ ... | - - ||  
 - - | ~ ~ | - - | ~ ... ||  
 ~ ~ | - - | ~ ~ | - ... ||

IV Versoko komenciĝanta per forta piedo:

- a.
- - | ~ ~ | - ... ||  
 ~ ~ | ~ ... | - - ||  
 ~ ~ | - - | ~ ... ||  
 - - | ~ ~ | - ... ||  
 - - | - ... | ~ ~ ||  
 ~ ~ | ~ ... | - - ||  
 ~ ~ | - - | ~ ... ||  
 - - | ~ ~ | - ... ||
- b.
- - | ~ ~ | ~ ... | - - ||  
 ~ ~ | - - | ~ ~ | - ... ||  
 ~ ~ | - - | - ... | ~ ~ ||  
 - - | ~ ~ | ~ ... | - - ||  
 - - | ~ ~ | - - | ~ ... ||  
 ~ ~ | - - | ~ ~ | - ... ||  
 ~ ~ | - - | - ... | ~ ~ ||  
 - - | ~ ~ | ~ ... | - - ||

Ĉiuj versoj, kiuj finiĝas per forta piedo, devas preni rimon, sed la unua verso de la poemo povas esti senrima laŭ la bontrovo de la poeto, en tiu kazo, la ritmoaranĝo

de tiu verso fariĝas respektive:

I, III

a. ~ ~ | - - | ~ ... ||

b. ~ ~ | - - | - ... | ~ ~ ||

II, IV

a. - - | - ... | ~ ~ ||

b. - - | ~ ~ | - - | ~ ... ||

Oni povas facile vidi, ke la dua duono de la versoko reale ripetas la ritmoaranĝon de la unua duono.

Ankaŭ la rimado havas sian apartecon. Ĉinaj vor-toj estas monosilabaj kaj ĉiuj finiĝas per vokalo aŭ diftongo, aŭ per vokalo (aŭ diftongo) kun aldonita “n” aŭ “ng”. Do ĉiuj vortoj finiĝantaj per la sama vokalo aŭ diftongo ktp. apartenas al la sama rimo. Tion rigardus la okcidentuloj ne rimoj. Tial rimado estas tre facila afero por ĉinaj poetoj. Por poemoj en malnova maniero oni povas uzi la saman rimon ĝis la fino, kiomajn longaj ili estus.

La rimaranĝo estas tre simpla. Ĝenerale ni metas rimon al ĉiuj parnombraj versoj, alternaj kaj ringaj rimoj ne ekzistas. Nur en longaj poemoj de sepsilabaj versoj en la malnova maniero oni kelkfoje uzas la kontinuajn rimojn, kiuj jam sekvas sin de la unua verso ĝis la fino en la sama rimo. Cetere oni ĉiam metas paŭzeton post ĉiu verso kaj transpaŝo estas malpermesita.

Tiuj apartaĵoj de la metrika aŭ rima sistemo estas neimiteblaj en Esperanta traduko.

La ĉina klasika lingvo estas multe pli konciza ol Esperanto kaj dum la tradukado, oni ĉiam trovas sin



postiĝanta en la vetkurado eĉ duobligante la longecon de ĉiu verso.

La supra skizo, tre elementa kaj ne kompleta, estas verkita por alilandaj Esperantistoj, kiuj deziras ion scii pri tiu subjekto sed ne havas la eblon legi en la originala lingvo.

**S. J. ZEE, Shanghai, januaro, 1980**

# Antikvaj poemoj

## KANTO DE MALJUNULO\*

Mi ellitiĝas ĉe l' tagiĝo  
Kaj ĉe la sunsubir' ripozas;  
Teron mi plugas por min nutri,  
Por trinki mi mem puton fosas:  
Kion mi devas danki al la suvereno!

---

\*La kanto estas supozita el la epoko de la legenda suvereno Tang Yao (*tang jaŭ* 24a jc. a. K.), sed ĝi aperis unuafoje en la Kroniko de Imperiestroj kaj Reĝoj de Huangfu Mi (3-4a jc.) el Jin(*ĝin*)-dinastio, kiam la taoistaj ideoj regis inter la intelektuloj.

## MIA HOMO

Mia homo, brava homo,  
Vera gloro de l' nacio,  
Lanco en la mano, marŝas  
Antaŭ l' reĝa procesio.

De foriro via, ĉesis  
La hararon mi aranĝi,  
Ĉu pomado al mi mankas?  
Ve, al kiu plaĉu jam ĝi!

Pluvos certe, pluvos certe,—  
Ree brila sun' jen pendas.  
Sopirante al vi, kara,  
Kardoloron mi ne plendas.

Ke post la ĉambro oni povus  
Planti forgessukan floron,  
Ĉar sopiri al vi, kara,  
Kaŭzas al mi kordoloron.

El *Libro de Poezio*\*

---

\* *Libro de Poezio*: La plej frua poemaro de Ĉinio, kompilita je la komenco de 5-a jarcento a. K., enhavanta 305 poemojn. La popolkantoj kaj poemoj el 15 vasallandoj spegulas la subpremadojn kaj ekspluatadojn de tiamaj regantoj kaj ankaŭ la laboradon kaj amon de la popoloj.

## MIA KARA ESTAS FOR

Mia kara estas for.  
Kiam devas li reveni?  
Tion mi ne povas eĉ diveni.  
Kokoj jam ripozis en murtruo,  
Sub la kliniĝantaj sunradioj  
Ŝafoj kaj bovoj trotras hejmen kun gojbruo.  
Mia kara estas for,  
Kiel ja povas tiu pens' ne min ĉagreni !

Mia kara estas for.  
Pasis tagoj kaj monatoj.  
Kiam ni revidos nin, amato !  
Kokoj jam ripozis sur sidstango.  
Sub la kliniĝantaj sunradioj  
Ŝafoj kaj bovoj enstaliĝas ankaŭ.  
Mia kara estas for,  
Dio lin gardu de soifo kaj malsato !

*El Libro de Poezio*

## ĈE LA PORDEGO ORIENTA

Ĉe la pordego orienta,  
Rubioj sur dekliva fono.  
La domo estas ja proksima,  
Sed malproksima — la persono !

Sub kastanujoj\* ĉe l' pordego,  
Via pureta dom' invitas  
Ĉu mi ne pensas pri vi, kara?  
Sed ve! vi ĉiam min evitas !

*El Libro de Poezio*

---

\* Anstataŭ 'kaŝtanujo' iuj legas 'arbovico'n

## TRANS LA ORDEGO

Trans la pordeg', virina ĉarmo  
Paradas kiel nubosvarmo.  
Malgraŭ grandega nombro tia,  
Ja mian koron ĝi ne tuŝas  
Jen blanka vest' kun blua tuko —  
Nur tie mia ĝojo kuŝas.

Virinoj ekster la remparo  
Pompadas kvazaŭ junkfloraro.  
Malgraŭ grandega nombro tia  
Ne al ĝi celas mia penso.  
Jen blanka vest' kun ruĝa tuko,  
Restas mia viv-rekompenso.

*El Libro de Poezio*

## KANTO DE JING KE\*

Fajfas la vento, frostas la rivera flu',  
Foriras la bravulo ka j jam ne revenos plu!

---

\* Reĝido Dan de Yan(*jan*)-lando iam restis en Qin(*ĉin*)-lando kiel garantiulo kaj estis malbone traktata. Li ĵuris venĝi sin. En 227 a. K., Zhao(*ĝaŭ*)-lando estis jam konkerita kaj ankaŭ la situacio de Yan estis en granda danĝero. Tiam la reĝido sendis Jing Ke (*ĝing ke*) al Xianyang (*ŝjan-jang*), la ĉefurbo de Qin por asasini ĝian reĝon, kiu poste fariĝis la unua suvereno de Qin-dinastio. Sed la entrepreno fiaskis kaj Jing Ke mortis. La reĝido kune kun aliaj adiaŭis lin en funebraj vestoj, sur la rivero Yishui (*jiŝuj*). Jing Ke faris ĉi kanton de la ekveturo (223 a. K.).



## POPOLKANTO

Mi volas kun vi amikiĝi  
Kunvivi, neniam disiĝi,  
Ĝis monto solviĝos je cindro.  
Sekiĝos la akv' en rivero,  
Fulmtondros rulbrue en vintro,  
Kaj falos la neg' en somero,  
Kunigos ĉielo kun ter':  
Nur tiam finiĝos por ni la afer'.

El *Han-dinastio* (2-a jc. a. K. - 2-a jc. p. K.)

## LA ORFO

Kiam orf' naskiĝas,  
Estas destinita al sufero !  
Dum gepatroj vivis,  
Mi veturis en kaleŝo  
Kun ĉevaloj kaj koĉero.  
Post la morto de l' gepatroj  
Frat' kaj bofratin' min sendis al negoco.  
Mi kuradis tien kaj ĉi tien  
Fore de la hejm' kaj sen ripozo.  
Mi revenas en la frosta vintro  
Eĉ ne kuragante plendi.  
La hararo estas nesto de pedikoj,  
La vizaĝon kovras polvo. Sed min sendi  
Al laboro kuireja ne prokrastas frato,  
Kaj la bofratino min ordonas zorgi pri l' ĉevalo,  
Jen rapidas mi al la salono  
Kaj tuj poste kuras al la stalo.  
Larmoj fluas kiel pluvofalo.  
De tagiĝo mi iradas ĉerpi akvon  
Kaj vespere returniĝas elĉerpita.  
Miaj manoj estas kalaj,  
La piedoj sensandalaj.  
Iras mi tra prujnaj kampoj  
Kiuj de la dornoj plenas.  
La enkarnan dornon mi tirrompas,  
Pro dolor' la vivon mi malbenas.

Larmoj falas gute gute,  
Tiom penas mi servute!  
Vintre mankas al mi dika jako  
Ka j somere — eĉ ĉemizo tola.  
Mia vivo estas tro senĝoja,  
Mi preferas tuj morti kaj iri  
Al la transa mondo senaŭrora!  
Jen printempa vento blovas,  
Junaj herboj sin elŝovas.  
La tria monato estas silkraŭpa sezono  
Kaj la sesa — tiu de rikolto de melono  
Mi ĉareton da melonoj tiras  
Sur la kampa voj' al nia domo.  
La ĉareto renversiĝas,  
Tre malmultaj donas helpon,  
La pli multaj venas ilin manĝi.  
Ho! redonu al mi nur la tigojn  
Ke mi hejmeniru por la aferon aranĝi,  
Ĉar la bofratino kaj la frato  
Estas kalkulemaj sen kompatato.  
La najbaroj faras tiom da malica bru'.  
Mi leteron volas skribi  
Al miaj gepatroj en la transa mondo:  
Vivi kun la frato kaj la bofratino mi ne povas plu!

*El Han-dinastio*

## DONG JIAORAO<sup>1</sup>

Ĉe l' orient' de Luoyang<sup>2</sup>, persik- kaj  
Prunarboj vice kreskas apudvoje,  
Folio sidas flanke de folio  
Kaj floro kontraŭ floro ridas ĝoje.  
Ili balancas ondomove, kiam  
Printempa vent' ekblovas iufoje.  
Jen junulin' kun korbo tie iras  
Por kolektado de morusfolioj.  
Brandeton ŝi ŝirrompas dum la iro  
Kaj floroj flirtas kiel papilioj,  
“Ho! kion ja mi faris, belulino,  
Nun falas sur min la maljusta puno?”  
“Kiam la perla ros' fariĝos prujno,  
En rigoraj monatoj de aŭtuno,  
La sorton de velkfal' vi ne evitos,  
Kaj ne longdaŭri povos la parfumo.”  
“Kvankam velkfalos ni en la aŭtuno,  
Tamen refloros dum printemp' sunrida;  
Kiam juneco via vin forlasos,  
Amĝoj' por ĉiam estos forgesita!”  
Mi volas fini tiun ĉi kanteton,  
Sed ĝi tro malĝojiga estas. Venu

---

1. Dong Jiaorao (*dong ĝjajǎjǎ*): Nomo de virino.

2. Luoyang (*lǔojang*): La ĉefurbo de Orienta Han-dinastio.

A1 la salono, trinku bonan vinon  
Ka j kune kordan muzikilon prenu !

Song Zihou (Han-dinastio)

# KANTO PRI PASERO EN

## KAMPO

Fajfanta vento taŭzas altajn arbojn,  
Kaj ondojn ĉiam levas vasta maro:  
Se akra spad' ne estas en la mano,  
Helpon atendas vane amikaro.  
Jen heĝ-pasero, nizon ekvidante,  
Malvole ŝetas sin en birdreton.  
La birdkaptisto ĝojas. pri l' kaptajo,  
Sed juna hom' kompatas la birdeton,  
Eltiras spadon kaj la reton frapas  
Tuj la pasero el la ret' eskapas.  
Ĝi flugas rekte en ĉiel-lazuron,  
Kaj redescendas danki la junulon.

— Cao Zhi\*

---

\* Cao Zhi (*caŭ ĝi* 192-232): La plej elstara poeto en sia tempo, tria filo de Cao Cao (la reĝo Wudi de Wei-regno)

## POEMO

Sennuba estas la ĉiel' vespera.  
Printempa brizo blovas milde.  
Ebria kvazaŭ de la bela nokto,  
Knabino ĝis tagiĝo kantas birde.  
Profunde ŝi suspiras post la kant',  
Homkoron forte tuŝas jena penso:  
La luno blanke brilas en nubar'  
Kaj floroj pompas en la folidensoj  
Unu momenton ĉio glore festas,  
Sed baldaŭ poste, ho ve! kio restas?

— Tao Qian\*

---

Tao Qian (*taŭ ĉian* 365-427): Poeto de Orienta Jin(ĝin)-dinastio

# NE LAVU LA RUĜAĴON!

## I

Ne lavu la ruĝaĵon!  
Pro ofta lav' paliĝos la koloro.  
Mi ne bedaŭras la malnovan veston;  
Fresa tinktur' ankoraŭ en memoro.  
Ho! Kiom longe daŭras homa vivo je la fino?  
La ĉarma novedzino jam fariĝis bopatrino!

## II

Ne lavu la ruĝaĵon!  
Ofte lavate, en la akvon falas  
La ruĝ'. Jen nova vest' en freŝa ruĝo,  
Kaj la malnovan ni substofa faras.  
Verdaĵo ofte antaŭtempe en velkflav' eksvenas.  
Ĉia mondaĵo — nekonstanta: certe vi komprenas.

E1 Jin(ĝin) -dinastio (265-419)



## CILE EBENAĴO

Cile ebenaĵo  
Kuŝas ĉe Yin-monto\*.  
La ĉielo kiel tendo  
Pendas ĝis la horizonto.  
Sub la ĉielblu' sen baro  
La paŝtejo vastas kiel maro.  
Kiam vent' klinigas herojn,  
Ekaperas bovoj kaj ŝafoj en aroj.

Hulŭjin (huljuĝin 6-a jarcento)

---

\* Yin (jin)-monto estas norda branĉo de Kunlun-montaro.

## MULAN

“Ho ve! Ho ve!” Mulan' laboras tie  
Sidante antaŭ l' pordo sur teksilo,  
Sed ne aŭdiĝas ia sono de l' naveto  
Krom ripetado de ŝia ĝemspiro.  
“Pri kio ja, knabino, vi ekpensas?  
Kaj kion tiel triste ekmemoras?”  
“Mi pri nenio pensas, pri nenio,  
Nek ion ajn mi triste ekmemoras.  
Mi nur mobilizilon lastvespere  
Vidis, la batalantojn ĥan' kunvokas.  
En dekdu libroj de l' nomlisto, ĉie  
La nomon de la patro oni lokas.  
Patro ne havas ja plenaĝan filon,  
Nek mi pliaĝan fraton, do ĉevalo  
Kun ĉiaj ekipaĵoj estu preta,  
Mi anstataŭos patron en batalo!”

Sur la vendplaco orienta oni  
Aĉetas por ŝi ĉevalon rapidan,  
Sur l' okcidenta — selon, sur la norda  
Vipon kaj sur la suda ĉevalbridon.  
Matene adiaŭis ŝi gepatrojn,  
Vespere dormis ĉe l' Rivero Flava,

Ne aŭdis ŝi la gepatran vokadon al filino  
Sed nur senĉesan murmuradon de ondaro sablolava.  
Matene adiaŭis ŝi l' riveron,  
Vespere dormis ĉe la Monto Nigra,  
Ne aŭdis ŝi la gepatran vokadon al filino,  
Nur tiratan henadon de ĉevaloj de la tribo migra.

Trakuris oni fluge dekmil liojn  
Tra montoj, fortikaĵoj ĝis la celo.  
La kornoj eĥis en aero frosta  
Kaj maŝkirasoj brilis en lunhelo.  
Mortis la general' post cent bataloj,  
Revenis la bravuloj post dek jaroj.

La ĥan' akceptis ilin kun soleno  
En la palac' ĉe l' triumfa reveno,  
Kaj ilin rekompencis per honoraj  
Titoloj kaj grandkvant' da monoj oraj.  
La ĥan' demandis, kion Mulan volas,  
Kiu respondis: "Mi oficon altan ne bezonas.  
Por tuj reveni al la patra domo, mi esperas  
Ke via most' kamelon flugan donas."

Aŭdinte la alvenon de l' filino,  
Gepatroj kune iris al la antaŭurb' piede;  
Aŭdinte la alvenon de l' fratino,  
Ŝia fratino' pliaĝa sin okupis tualete:  
Kaj jam tranĉilon la plejjuna frato  
Akrigis kun fervor' por porko- kaj ŝafobuĉado.

La pordon de la ĉambro ŝi malfermis,  
Kaj sur la lito side ripozetis,  
Demetis la soldatan kamizolon  
Kaj la malnovajn vestojn resurmetis,  
Antaŭ spegul' aranĝis la hararon  
Kaj sian tualeton ekenketis.  
Nun ŝi eliris al la kamaradoj,  
Kiuj miregis ekvidante ŝin;  
Oni pasigis kune dekdu jarojn,  
Sed sciis ja neniŭ, ke Mulan estas virin'.

Vira leporo kun ĝojsaltaj kruroj  
Kaj ina kun rigardo dolĉe brila:  
Se du leporoj tiel iras kune  
Kiu distingi povus do la inan de la vira?

Popolkanto de la Nordaj Dinastioj (420-589)

## KANTOJ DE NORDA POPOLO

Se oni havas volon esti kuraĝulo,  
Ĉu multajn kamaradojn li necese havas?  
Ondtuŝe la paseroj flugas pare,  
Dum aglo unuope tra l' ĉielo pafas.

\* \* \*

Kvinfutan glavon antaŭ tagoj mi aĉetis,  
Kaj ĝin pendigis sur kolonon centra-halan.  
Tri fojojn mi ĝin mankaresas ĉiutage,  
Kaj ĝin pli amas ol knabinon dekkvin-jaran.

\* \* \*

Ke mi estu vipo por mia karulo,—  
Kiel mi ĉiam vivas en enuo! —  
Veture pendu mi sur lia brako  
Kaj sidu tiel ĉe lia genuo.

(5-a aŭ 6-a jc.)

## AMKANTO

La luno brilas kaj la steloj subiros senbrue,  
Ĉu vi intencas veni aŭ ne; diru al mi frue !

## ADIAŬPAROLO DE FORLASITA EDZINO

Sur Jinshui<sup>1</sup>, kiu al nordoriento  
Fluas, dancante naĝas ajksoparo<sup>2</sup>.  
La vira sur palaca arbo nestas,  
La ina sin amuzas en herbaro.  
Ili preferas morti kun flugiloj frakasitaj  
Ol ekdisiĝi unu de l' alia en nubmaro!

Jen Ajiao<sup>3</sup>, la reĝin' en malfavoro, sides  
Sola malĝoje ĉe la vesperiĝo en haremo.  
Por rekonkeri la favoron de Lia Majesto  
Ŝi ne avaris pagi por apologi-poemo.  
Kiam Xiangru poemon verkis kaj ricevis oron,  
Nova pasio ekkatenis la ŝanĝeman koron.

Aŭdinte, ke li pretas svati knabinon de Maoling<sup>5</sup>,

---

1. Jinshui (*ĝinŝuj*), t. e., Silkaĵo-rivero, fluas preter Chengdu (*ĉengdu*), la ĉefurbo de la nuna Sichuan (*siĉuan*)-provinco. La koloro de silkaĵoj tinkturitaj per ĝia akvo estas neordinare freŝa.

2. Ajkso: *Aix galericulata*. Speco de anaso kun belaj plumoj, en kiu ĉinoj vidas simbolon de fidelaj kaj feliĉaj geedzoj.

3. Ajiao (*aĝjau*), reĝino detronigita de Wudi de Han-dinastio.

4. Sima Xiangru (*ŝjangŝu*), tiama granda verkisto.

5. Maoling (*maŭling*), urbo ne malproksima de la tiama ĉefurbo, Chang'an (*ĉang'an*).

Lia edzino sendis al li adiaŭparolon:  
“La akvo, kiu fluas maron, neniam, refluos,  
Kaj la malnova branco naŭzas la falintan floron,  
Kuskuto<sup>6</sup>, kiu estas amlibera,  
Kliniĝas ĉiufanken laŭ la vento,  
Kiam neatendite la usneo<sup>7</sup>  
Sin turnas al ĝi kun brako-etendo:  
Jam sin kunligas ĉiam la du plantoj,  
Sed pli kaprica estas la homsento!  
Ho, ne kunvolu la junkmaton, lasu  
Araneaĵon kovri ĝin por ĉiam!  
Restu la kapkuseno el sukceso,  
Mi en la songo eble venos iam.  
La akvon elverŝitan rekolektos vi kun vana peno,  
Edzino forlasita adiaŭas vin jam sen reveno.  
Kie ekzistas vera fidelec’ en historio  
Krom Qinglingtai<sup>8</sup>, la unusola specimeno?”

Li Bai<sup>9</sup>

---

6. Kuskuto: *G. Cuscuta*.

7. Usneo: *Usnea longissima*.

8. Qinglingtai (*ĉinglingtaj*), tio estas Qingling-altano. Laŭ legendo, Kang’wang de Song-lando forprenis perforte He, la belegan edzinon de Han Peng, iu kortegano. Han sin mortigis. Ankaŭ He ĵetis sin malsupren de la altano kaj mortigis sin, kun skribaĵo



petante ke oni enterigu ilin kune. La reĝo koleregis kaj ordonis enterigi ilin aparte. Sed du arboj baldaŭ kreskis sur la tomboj. La branĉoj interplektiĝis kaj du birdoj kantadis malĝoje tage kaj nokte tie supre.

9. Li Bai (*li baj* 701-762): Granda poeto de Tang-dinastio. Liaj poemoj kun flua natura lingvo kaj akordaj variaj ritmoj estas imagplenaj kaj riĉaj je la spirito de pozitiva romantikismo.

# BATALO CE LA SUDO DE LA URBMURO

Lastjare ĉe la fonto de Sanggan' oni batalis  
Kaj nune en la valo de Congling-rivero:  
En Tiaozhi<sup>1</sup>-maro oni lavas iam la armilojn  
Kaj paŝtas la ĉevalojn en la neĝ' sur Mont' Ĉielo.  
Jen armeanoj ĉiuj maljuniĝas  
Trans dekmil lioj sub la Marŝa pelo.  
Anstataŭ terkultur', buĉado estas la meti' de hunoj,  
Surkampe oni vidas simple flavan sablon kaj blankajn  
ostarojn  
Muregon Qin<sup>2</sup> konstruis por, forbari la invadon  
Dum Han ankoraŭ levas oni alarmosignalojn.  
Ne ĉesas alarmosignaloj bruli,  
Nek ĉesos iam la sanga batalo.  
Kiam surkampe falis la rajdanto,  
Al la ĉielo triste henas la orfa ĉevalo.  
Korvoj kaj milvoj bekŝiras intestojn,  
Forflugas kaj pendigas ilin sur la velkbranĉaro.  
Soldatoj iĝis sterko por herbaĉoj,

---

1. Tiaozhi (tjaŭĝi): Nomo de lando ĉe Persa Golfo.

2 Qin (ĉin): Qin-dinastio.

Senpova restas jam la generalo.  
Pruviĝas, ke armilo estas supera malbono,  
Saĝuloj uzas ĝin nur kontraŭvole pro nepra bezono.

Li Bai

# LA MALFACILECO DE LA VOJO AL SHU<sup>1</sup>

Ve! ho ve! Kiel kruta kaj danĝera!  
La vojo al Shu estas pli peniga ol la vojo al ĉiela!  
Cancong kaj Yufu,<sup>2</sup> la fondintoj de la regno,  
Jam longe dronis en nebul' fabela.  
Dum kvardek ok mil jaroj kun la logantar' de Qin<sup>3</sup>  
Neniu vojo iel ĝin interkomunikigis,  
Se birda vojo tie okcidente sur Taibai'<sup>4</sup>  
Kiu la supron de Emei'<sup>5</sup> trahakis, ne efikis.  
Nur post la morto de la forteguloj<sup>6</sup> pro l' terglito,

---

1. Shu (*ŝu*), la antikva nomo de la nuna Sichuan-provinco.

2. Cancong kaj Yufu(*jufu*), du legendaj reĝoj de la antikva Shu-regno.

3. Qin, la antikva nomo de la nuna Shaanxi (*ŝanŝji*)-provinco.

4. Taibai (*tajbaj*), alta monto en Shaanxi-provinco.

5. Emei(*emej*), granda montaro en Sichuan-provinco.

6. Laŭ legendo, Huiwang, reĝo de Qin-regno, sciante ke la reĝo de Shu amas belajn virinojn, promesis edzinigi al li kvin belegajn virgulinajn. La reĝo de Shu sendis kvin fortegulojn por ilin renkonti kaj eskorti. Kiam la irantaro atingis Zitong, oni ekvidis serpentegon, kiu enrampis truon. Iu el la forteguloj ekkaptis ĝian voston, sed ne povis ĝin eligi, tiam la aliaj forteguloj donis al li helpon kaj tiris kune. La monto ekfalas kaj premmortigis la fortegulojn. La monto dividis sin je kvin.

La du landpartojn oni per kornic' surfosta iam  
ekkunligis.

Supre rokpinto, antaŭ kiu retirĝas la sunĉar' sesdraka,  
Kaj sube kirla, ŝaŭma, tondre brua kaj torenta flu'  
zigzaga.

Ĝi eĉ la flugon de migrantaj flavaj grupoj spitas,  
Kaj antaŭ surgrimpado la simioj ekhezitas.  
En nigra koto, oni dum cent paŝoj  
Naŭ turnojn devas fari inter rokoj kaj krutaĵoj.  
Sidante kun stelaroj en tuŝodistanc', penspiras  
Mi, kaj kun man' premante al la brust' suspiras.  
Kiam revenos vi de la vojaĝ' al okcidento?  
La malfacila vojo estas por homoj turmento.  
Aŭdiĝas nur malĝojaj birdoj plendi inter arboj,  
Viraj kun inaj ĉirkaŭflugas sub foli-tegmento,  
Kaj la kukoloj krias kontraŭ l' nokta luno,  
En la senhoma monto.  
La vojo al Shu estas pli peniga ol la vojo alĉiela,  
Ekvelkos la vizaĝo roza de la aŭskultanto!  
Jen vicoj da montpintoj preskaŭ la ĉielon fendas,  
Supro malsupren velkaj pinoj ĉe l' krutaĵoj pendas.  
Surdige vete tondras la torentoj, akvofaloj,  
Kun ŝtonruliĝo kaj ondbat' resonas ĉiuj valoj.  
La vojo de danĝeroj tiel plenas,  
Kial vi, ho fremduloj kompatindaj el grandega  
malproksimo venas!  
Jian' ge<sup>7</sup> minace kiel tur' la vojon baras,  
Dekmil ne povus ĝin trarompi,

Se unu viro gardostaras.  
Sed se l' gardant' ne estas fidindulo,  
Tiam l' lupo aŭ ŝakal' sin faras.  
Matene nin timigas tigroj,  
Vespere longaj la serpentoj,  
Kiu mortigas senkompate  
Kun sangsoif' kaj akraj dentoj.  
Kvankam Silk-urbo<sup>8</sup> estas plezuriga,  
Preferinde ĝustatempe hejmeniri.  
La vojo al Shu estas pli peniga ol la vojo alĉiela!  
Rigardi okcidenten ĉiam igas nin suspiri.

— Li Bai

---

7. Jian'ge (*ĝjange*): Urbo ĉe montpasejo, kondukanta al Qin, la nuna Shaanxi-provinco. Ĝi estis strategia punkto dum milito.

8. Silk-urbo: Chengdu, la ĉefurbo de Sichuan, kiu estis fama pro ĝia produktado de belkolora silkaĵo.

# LA LEVIĜO KAJ SUBIRO DE

## LA SUNO

La suno leviĝas de la oriento,  
Kvazaŭ emergŭs ĝi el sub la tero:  
Ĉielon trakurinte, ĝi reiras en la maron.  
Kie la ripozejo de l' ses drakoj en vespero?  
De la komenco ĝis eterno ĝi neniam haltas.  
Ĉu homo, ne estante kreo-forto,  
Povus ja longe vagi kun ĝi sur la tempo-relo?  
Herboj ne dankas la printempon pro sia florado,  
Kaj arboj ne kulpigas la aŭtunon pri la velko.  
Kiu ja kvar sezonojn iam pelus per vipklako?  
Ĉio estiĝas kaj finiĝas: jen de la Naturo verko.  
Xihe<sup>1</sup>, ho sun-veturigisto!  
Kial vi dronas en la abisma obskuro?  
Kian meriton havas Luyang<sup>2</sup>, ke li  
Baris per lancosving' al la sun-kuro?  
Kia krimego do estas  
Kontraŭ ĉielo kaj Naturo!  
Mi volus jam la tutan kosmon ĉirkaŭbraki  
Kaj unuiĝi kun la vivofont' en la eterna lulo!

—Li Bai

---

1. Xihe (*ŝihe*), sun-veturigisto en legendo.

2. Luyang(*lujang*), fortegulo en legendo.

## LONGA DISIĜO

Pluraj printempoj pasis, sed ne venas li ankoraŭ.  
Ĉe l' jadfĕnestro ĉerizuj' kvinfoje jam en floro.  
Leteroj karesvortaj venis iam,  
Ĉe l' malferm' nur ĝemis mia koro.  
Tie sopir' turmenta,  
Ĉi tie malespero.  
La hararanĝon mi ne zorgas plu pro korsufero:  
Kirligās tristaj pensoj kiel neĝo sub ventpelo.  
Lastjare al hejmenreven' mi penis lin instigi,  
Ĉĭtiu-jare mi reskribis por lin rapidigi.  
Blovu, ho, blovu orienta vento,  
La vagantan nuberon blovu al mi en la okcidento!  
Vana atend'! Li ĉiam ne revenas,  
Nur la falintaj floroj sur la musk' senbrue svenas.

— Li Bai



## LA ĈIAM SOPIRATA

La ĉiam sopirata  
En Chang'an estas nun.  
Griloj ĉe l' putomuro ĉirpas triste en aŭtun'.  
La junkomat' impresas fride dum la frua prujn'.  
Ĉe orfa duonhela lamp' mi dronas en medito,  
Disŝovas la kurtenon, ĝemas vane al la lun'.  
Tie trans la nubaro fore foras mia belo:  
Supre senfine blua pendas la alta ĉielo,  
Kaj sube ondas, ŝaŭmas longa verdakva rivero.  
Senlima estas la ĉielo kaj la voj' peniga,  
Eĉ en la nokta song' neatingeblas la korcelo.  
Ho, ĉiam sopirata!  
Kruelas la sufero!

—Li Bai

## ZIYE-KANTO AŬTUNA

La tuta Chang'an estas nun banita en lunlumo  
Kaj tie eĥas vestobastonado law kutimo.  
Ne povas la aŭtuna vento iam ĝin forblovi,  
Tiun etoson de Yumen\*, etoson de l' landlimo.  
Kiam la malamikojn oni sukcesus disbati  
Kaj l' edzo ĉesus militservi en la malproksimo !

— Li Bai

---

\*Yumen (*jumen*), unu el la ĉefaj pasejoj kiuj kondukis trans la nordokcidentan landlimon de Ĉinio en antikveco.

## AL LU, KIU FORVOJAĜAS

Kaj fore kaj proksime, ĉie regas la aŭtuno,  
Ekster la pordo, la montvicoj staras en silento.  
Kiel konato, jen nubero blanka malproksime  
Ŝvebpendas super la montaro Cangwu en atendo.  
Mi volas scii, jes ja, kiam vi revenos hejmen,  
Ho gru' de Ludan\*, kiu flugas al la okcidento?

— Li Bai

---

\* Legenda senmortulo. La poeto uzas lian nomon por aludi al la forvojaĝanto.

# FORLASO DE BAIDI EN LA MATENO

En matenrugo mi forlasis la monturbon Baidi<sup>1</sup>,  
Le la tagfin' alvenas jam Jiangling<sup>2</sup> post mil lioj.  
Boat' malpeza preterpasis jam mil kaj mil montojn,  
Eĥas ankoraŭ ambaŭborde la simiaj krioj.

— Li Bai

- 
1. Baidi (bajdi), monturbo en Sichuan-provinco.
  2. Jiangling (ĝjangling), gubernio en Hubei-provinco

# AL MENG HAORAN, KIU VETURAS AL YANGZHOU

Mia amik' forlasis Pavilonon Flava Gruo<sup>1</sup>  
Por Yangzhou<sup>2</sup> en monato tria, pompa florsezon'.  
Jen la soleca velo dronis jam en for a bluo,  
Nur la rivero fluas ĉiam sur la ĉielfon'.

— Li Bai

---

1. Fama antikva konstruaĵo en Wuchang (*uĉang*), Hubei-provinco, ĉe Changjiang (*Jangzi-rivero*).

2. Yangzhou (*jangĝoŭ*) : Urbo sur la norda bordo de l' rivero kontraŭ Zhenjiang (*ĝenĝjang*), Jiangsu (*ĝjangsu*)-provinco.

# ADIAŬ AL LU, KIU VETURAS AL BIVO-KANJONO

La venta nokto de aŭtun' en akva lando  
Ne estas ĝusta tempo por veturi for.  
Chang'an en sonĝo kvazaŭ! Kiam por ni ambaŭ  
Tien reiri venos ja favora hor'!

— Li Bai

## POEMO

Ne forbalaebila estas lumo luna;  
Kaj ne esprimeblas la homaj sopiroj !  
La rosgutoj perlas sur la vest' aŭtuna,  
Super la herbejo flugas jam lampiroj.  
Ankaŭ al la sun' kaj luno venos fine  
Kaj ĉiel' kaj ter' forvelkon ne evitos.  
La cikado kantas sur la verda pino,  
Ĉu la maljuniĝon de la arb' ĝi vidos?  
Ne mensogo ja — la ŝtono de l' saĝuloj,  
Tamen de blinduloj vanas serĉo plua.  
Kaj vi ĉiuj ja ne estas miljaruloj,  
Ne malofte plendas vi pri morto frua !  
Drinku el jadrucko, poste en ĝin saltu !  
Vin enfermu tie, ĉiam bone fartu !

— Li Bai

## MEDITO PRI LA ANTIKVA REGNO YUE

Kiam Gou jian\* revenis venke super malamikoj,  
La batalantoj hejmeniris en silkotunikoj  
Kaj la palac' printempa de virginoj floraj plenis —  
Sed oni vidas nun nur la rondflugon de perdrikoj!

— Li Bai

---

\* Goujian (goŭĝjan), la fama reĝo de Yue (jŭe)-regno. La batalo okazis 473 a.K.



# RIGARDO AL LA MONTO

## ĈIELA PORDO\*

La grandrivero tra la fendo de Ĉiela Pordo  
Kuradas orienten kaj turniĝas al la nordo:  
Leviĝas bluaj montoj ambaŭflanke vidalvide,  
De apud sun' soleca vel' alnaĝas sur ventporto.

— Li Bai

---

\* Monto Ĉiela Pordo, alinome la Orienta Liang-monto, situas ĉe Changjiang (Jangzi-rivero) en Anhui-provinco.

## LA OK GENIOJ-VINAMANTOJ

Zhizhang<sup>1</sup>, rajdante sur ĉevalo kvazaŭ enboate,  
Falas en puton nebulvide, tie dormas plate.

Tri doŭojn<sup>2</sup> eltrinkinte, Ruyang<sup>3</sup> al kortego iras.  
Ĉe l' vido de vinĉaro liaj okuloj ekbrilas  
Kaj havi Jiuquan<sup>4</sup> por feudlando sia li sopiras.

La ĉefministr' elspezas dekmill tage por festeno.  
Kaj drinkas kvazaŭ cent riverojn englutus baleno.  
Pokal' en mano, li parolas pri ced' de l' posteno.

Cui Zongzhi<sup>6</sup> estas eleganta kaj bela junulo.  
Pokalon levas li, okulojn al ĉiellazuro  
Turnas, gracia kiel jadoarbo en ventlulo.

Su Jin<sup>7</sup>, Budaon kultas antaŭ brodita ikono

---

1. Zhizhang, t.e. He Zhizhang (*he ĝîĝang*): Fama poeto de Tang-dinastio, amiko de Du Fu.

2. Mezurilo por fluidaĵo.

3. Ruyang (*fujang*): Princo, amiko de He Zhizhang.

4. Loknomo, signifanta: vinfonto.

5. T.e. moneroj.

6. Cui Zongzhi (*cuj zongĝi*): Amiko de Li Bai.

7. Su Jin (*su ĝin*): Poeto de Tang-dinastio.

Ebria, li forgesas ofte pri l' eterna bono.

Ekfluas cent poemoj el la dia plum' de Li Bai  
Ĉe la pokal', Li, en drinkejo en Chang'an dormanta,  
Rifuzis enŝipiĝi malgraŭ la alvok' monarĥa:  
"Via servant'," li diris, "estas feo vinamanta!"

Post tri pokaloj Zhang Xu<sup>8</sup> sian belan skribon provas,  
Antaŭ magnatoj grandaj sian kapon li malkovras  
Kaj kiel flugan nubon la penikon jen manovras.

Nur post kvin doŭoj montras Jiao Sui<sup>9</sup> sian tutan brilon  
Kaj per elokventeco vekas en ĉiu admiron.

— Du Fu<sup>10</sup>

---

8. Zhang Xu (*ĝang ŝju*): Homnomo.

9. Jiao Sui (*ĝjaŭ suj*): Homnomo.

10. Du Fu (712-770): Granda poeto de Tang-dinastio. Liaj poemoj kun varia stilo kaj konciza lingvo estas esprimplenaj.

## BALADO PRI MILITĈAROJ

Rulknaras veturiloj,  
Ĉevaloj brue henas,  
Rekrutoj sagojn kaj pafarkojn de la lumboj tenas.  
Ilin postkuras tiom da gepatroj kaj edzinoj,  
Ke Xianyang-pont' en polvonubo dense densa dronas.  
Vojbare oni vestokroĉe kaj kun piedbatoj  
Lamentas, ke la ĉielvolbo de vead' resonas.  
Pri l' kaŭzo informiĝas iu hazarda pasanto.  
"Konskripciite!" diras ripetfoje foriranto.  
"Iu riveron gardis norde de l' dekkvina jaro,  
Ĝis kvardek en ŭesto garnizone terkulturis.  
Ĉe la forir' pedel' aranĝis por li la kaptukon.  
Revene, jam grizulo, li denove forveturis.  
Ĉe la landlimo sang' verŝiĝas kiel mara akvo,  
Sed ne satiĝas, ve! Lia Majesto teravida.  
Ĉu vi ne aŭdas:  
En la ducent kantonoj oriente de Hua-monto,  
Vilaĝoj ĉie dezertiĝas pro bankrot' rapida.  
Eĉ se virinoj fortaj prenas sur sin la laboron,  
La grenokampojn sieĝadas herbadar' senbrida.  
Cetere, la soldatojn el Qin oni ĉen pelas  
Kiel ŝargbestojn pro ilia braveco penspita.  
Kvankam vi min demandas kun scivolo,

Ĉu mi kuraĝas plendi, ho sinjoro!  
Ekzemple, en ĉi tiu jaro vintre,  
Dum nin katenas la militorgio,  
La ŝtat' imposton ekpostulas urĝe,  
Per kio povus ni pagi, per kio?  
Jen klara vero: estas preferinde  
Naski filinon ol infanon viran:  
Filinon oni povus edzinigi al najbaro,  
Dum pereo sensenca stampis jam la sorton filan.  
Ĉu vi ne vidas:  
Ĉe l' Blua Maro,  
Ekde pratempo blankas disĵetite la ostaro.  
Novaj animoj ĉagreniĝas kaj malnovaj ploras.  
En pluva tago ĉiuj ĝemas sub nebulvualo?"

— Du Fu

## LUNA NOKTO

En Fuzhou\* la hodiaŭnoktan lunon  
Rigardas la edzino unusola,  
Ĉar la infanoj etaj ne scipovas  
Ankoraŭ pensi pri l' patro fora.  
Ŝia harar' humidus de nebulo,  
Kaj en purbrilo fridus la brakĉarmo.  
Ho, kiam ĉe fenestro, prilumite,  
Duopos ni kun sekigita larmo?

— Du Fu

---

\*Fuzhou (*fuĝoi*): Nuna Fuxian (*fuŝjan*)-gubernio,  
Shaanxi-provinco.

## PRINTEMPA VIDAĴO

Restas nur montoj kaj riveroj el ruina regno;  
Printempe la ĉefurbo plenas de herbaro densa.  
La floroj verŝas larmojn pro l' malordo de la tempo  
Kaj birdoj maltrankvilas por la foresto parenca.  
La militfajro, ho ve! brulas daŭre tri monatojn,  
Buŝelon da ormon' egalas ja leter' el hejm'.  
Ĉiam pli kaj pli mallongiĝas miaj blankaj haroj,  
Ke kune fiksi ne plu povas la harpinglo mem.

— Du Fu

## HEJMENREVENO

### I

En okcident', sub flame ruĝa nuboj,  
La sun' kliniĝas jam ĝis la eben',  
Antaŭ l' kaban' kverelas birda trupo:  
Jen, de l' vagant' millia, la alven'.  
Mireg' tutdoma pri ĉeesto mia:  
Trankviliĝinte ni salutas larme.  
Migrante en malorda tempo tia,  
Dank' al bonŝanc' nur, mi revenas karne.  
De najbaroj scivolaj korto plenas,  
Kunsenta larmo ĉiujn premas gorĝe.  
Ĝis tarda nokto ni kandelon tenas,  
Sendormas, vidalvide — kvazaŭ songe!

### II

En maljuneco, mankas vivrimedo,  
Ĝojon ne trovas mi en hejmareveno.  
Infano kroĉiĝanta algenue  
Ekretiriĝas de mi kun timĝeno.  
Antaŭe mi, serĉante ombron, ĉiam  
La arbojn ĉirkaŭiris ĉe l' laĝeto,  
Nun fajfas norda vent', en mia koro  
Cent premaj zorgoj bolas en sekreto.



Feliĉe greno estas rikoltita  
Kaj de l' premil' jam gutas vin' aŭdplaĉe.  
Nun mi sufiĉe havas por trinketi:  
Min konsoletas do maljunaĝe.

### III

La kokoj krias kaj kverelas brue,  
Granda ĥaoso regas en la korto.  
Oni dispelas ilin sur la arbojn,  
Tiam aŭdiĝas frapoj sur la pordo.  
Kvar-kvin najbaraj maljunuloj faras  
Al mi viziton pro la longforesto.  
Ĉiu alportas ion, kaj jen vinon  
Flavan aŭ blankan verŝas el rondkesto.  
“Tian malfortan vinon ne rifuzu!  
La milikampon ja neniŭ flegas:  
Infanoj ĉiuj iris al la fronto,  
Ĉar la milit' ĉiam furiozegas.”  
“Jen mia kanto, oĉjoj: en penego  
Min ege tuŝas via kora varmo!”  
Post kanto, mi ĝemspiras al ĉielo  
Kaj disfandiĝas ĉies kor' en larmo.

— Du Fu

# LA PEDELO DE SHIHAO-VILAĜO<sup>1</sup>

Dum mi tranoktis en Shihao-vilaĝo,  
Okazis tie rekrutig' per forto:  
Trans muron savis sin la maljunulo,  
Maljunulino paŝis al la pordo.  
Kiel kolere la pedelo bojas!  
Kiel petege la virin' malĝojas!  
Jen de l' virino kortuŝa rakonto:  
“Tri filojn oni ekspedis al fronto.  
Leter' de unu venis lastatempe:  
La du aliaj estas ĵus falintaj.  
En malcerteco vivas la vivanto,  
Por ĉiam jam finiĝis la mortintaj!  
Restas neniuj plu nun en la domo,  
Escepte de nepeto, suĉinfano,  
Kun la patrino vidva, kiun kovras  
Nur ĉifonaĵ' de kapo ĝis kalkano.  
Kvankam mi estas febla kaj maljuna,  
Tamen mi volus jam nun kun vi iri  
Por servi la armeon apud Heyang<sup>2</sup>  
Kaj matenmanĝon ĝusttempe kuiri.”

Silent' reregis en malfrua nokto,  
Iu singultis, ŝajne, en angulo.

Kiam mi survojiĝis la matenon,  
Min adiaŭis nur la maljunulo.

— Du Fu

---

1. Shihao(*shihai*)-vilago, en nuna Shanxian (ŝanŝjan)  
-gubernio, Henan-provinco.

2. Heyang(hejang): Nuna Mengxian(mengŝjan)-gubernio de  
Henan-provinco.

# LA DISIGO DE NOVE-GEEDZIGITOJ

Kroĉige al kanabo aŭ eriko  
Ne povas alten grimpi la kuskutoj\*;  
Kvazaŭ survoje estus forĵetita  
Virin' edziniĝinta al rekruto.  
Dum mi fariĝas via novedzino,  
Eĉ ne varmiĝas mat' en via lito.  
Vespere nupta festo, sed matene —  
Jam adiaŭo! Ho, kia rapido!  
Ne longas kvankam la vojaĝ', en Heyang  
Sur fronto vi servados garnizone,  
Sed kiel mi salutu l' bogepatrojn  
Ne plenuminte ritojn laŭbezone?  
En patra domo oni min edukis  
Ĉiam al enfermiĝo kaj modesto;  
Ili esperis, ke foje ligitaj  
La geedzoj vivados en kunesto.  
Nun malgraŭvole kuras vi al morto,  
Doloro la intestojn al mi tordas.  
Mi, ho ve! volus iri kune kun vi,  
Sed pli da implikaĵo tio portas,  
Jam ne memoru pri via edzino,

---

\* Kuskuto: *G. Cuscuta*.

Penu prizorgi vian militservon !  
Virino en armeo, oni diras,  
Faros ĝin perdi sian vervon.  
Mi, malriĉa knabino, perlaboris  
Longe kaj malfacile silkan veston:  
Mi ne plu ĝin bezonas kaj forlavas  
Ankaŭ la ŝminkon en via ĉeesto.  
Supre la birdoj grandaj aŭ malgrandaj,  
Flugadas ĉiuj pare en konkordo,  
Sed devas ni disvivi por eterne,  
Kiel perfidas, ve, la homa sorto !

— Du Fu

# BATPURIGO DE LAVATAJ

## VESTOJ

Mi scias ankaŭ, ke li ne revenos hejmen,  
Sed polvon mi forviŝas de la lavoŝtono  
Ekde l' aŭtuno. Min korprenas longdisiĝo,  
Krom proksimiĝo de la vintra frostsezono,  
La penon mi ne timas, por ke la vestaĵoj  
Atingu l' foran urbon de la garnizono.  
Jam elĉerpiĝis mia forto virinbraka,  
Aŭdiĝas tamen nur la en aer' resonono.

— Du Fu

## MALZORGEMULO

Mia kaban' okcidente de l' Pont' Wanli',  
Kun la klarakva Lago de Cent Floroj antaŭ ĝi.  
Senpolvajn verdajn bambuetojn lulas milda vento  
Kaj post pluvet' odoras la lotusoj en silento.  
Amikoj ĉesis skribi al mi alte salajrataj  
Kaj aspektas malgaje la infanoj oftmalsataj.  
Devenis ja de malzorgemo la mizero nuna,  
Sed mi, ridinde ja, des pli malzorgas, pli maljuna.

— Du Fu

## VERSKVAROJ

### I

Sen posedant' ne estas la de mi plantitaj arboj,  
Kaj la kabano malaltmura — mia hejm' ankoraŭ,  
Sed la printempa vento kvazaŭ rajtus min ofendi,  
Dumnokte ĝi blovrumpis kelkajn branĉojn de la floro.

### II

Bone sciante, ke l' kabano estas tre malgranda,  
Hirundoj sur rivero, tamen, ofte ĝin vizitas,  
Per tero malpurigas jen la sepkordon aŭ librojn,  
Jen dum insektokapto nin flugile frapincitas.

— Du Fu



## NOKTA PENSO DUM ŜIPVOJAĜO

Ĉe l' bordo kun teneraj herboj en venteto,  
Soleca nokto, ŝipo kun altstara masto.  
Lunlumo fluas onde en la grandrivero  
Kaj steloj pendas super la ebena vasto.  
Ĉu pro la verkoj mi akiris mian famon?  
Dank' al malsano venis fine la libero.  
Al kio mi similas ĉie migradanta?  
Vaganta mevo inter tero kaj ĉielo!

— Du Fu

## SUNREBRILO

La norda flanko de Chuwanggong\* jam sin lasis  
  Al la krepusk-uzurpo,  
Sed lasta spuro de la pluvo ĵus forpasis  
  Nun apud Baidi-urbo.  
Sunbrilo resendita de l' river' zigzagas  
  Sur la rokaj krutaĵoj;  
En nubalfluo, kiu la arbojn ĉirkaŭbrakas,  
  Dronas la montvilaĝoj.  
Maljuna kaj malsana je la pulm', enlita  
  Mi altkusene restas.  
En forprovinco kun la pord' frue fermita,  
  Dum malordego kreskas.  
Ne povas longe resti, kie ĉiam plagas  
  La ŝakal-tigra bando,  
Sed la anim' nerevokita erarvagas  
  Ankoraŭ en sudlando!

— Du Fu

---

\* Tio estas la Palaco de la reĝo de Chu(ĉu)-regno.

## SUR ALTANO

Ho! altas la ĉielo. Vento blovas forte.  
Eĥas simikriad' korŝira.  
Blankas la sabla strando. Klaras akv' ĉeborde.  
Birda rondflugo ŝvebfacila.  
Jen pluvos, pluvos kirliĝanta folimaro  
Susure sur la fon-senlimo  
Kaj ĉiam alruliĝas senfina ondaro  
De l' rivereg' el malproksimo.  
Min migrandantan dek mil liojn for de hejmo  
Premas autuna trist' nebula.  
Ĉi supre, mi rompita de oft-malsanemo  
Rigardpromenas senkunula.  
En peza temp' la prujne kovritan hararon  
Elkore volas mi malbeni  
Kaj pro deprimiteco ankaŭ l' vinpokalon  
Ŝatatan nun mi ĉesas teni.

— Du Fu

## LAMENTO PRI L' KABANO

### DETRUITA DE L' AŬTUNA

#### VENTO

Septembra vento muĝas furioze, kaj forĉasas  
Pajltegon tritavolan de sur la kaban' pretere.  
La pajl' transflugas fluon kaj sin disĵetita lasas;  
Jen surkroĉiĝas al arbsupro alta mallibere,  
Jen kirle-flirte falas en glimmarĉon ĉe-rivere.

La knaboj de la sudvilaĝ', ho aroguloj! en la hela tago  
Rabiste agas, mian maljunecon primokante,  
Enkuras bambuaron, pajlfask' sub la brako!  
Kun lang' kaj lipoj sekaj, vane alvokante,  
Suspiras mi rezigne sur baston' min apogante.

La vento mutas baldaŭ kaj inknigras nubtavolo,  
Ĉielon nebulgrizan surprizkaptas jam vesper',  
Mia multjara litkovril' glacias kvazaŭ fer',  
Pro l' buba piedbat' ŝiriĝis ĝia suba tolo.

La pluvo dense falas kvazaŭ stangoj de lupolo,  
Tegmenton trapenetas ĉe l' litkap'— sen seka ter',  
Sur la malsekaĵo kiel ja ripozi ĝis aŭroro?

Se dekmilcambra palacego ie estus nur.  
Sub kies ŝirm' la malriĉuloj de l' tutmondo vivas  
korkontente,  
Kaj spite ŝtorm' ĝi starus montsimile en sekur'.  
Ho! kiam antaŭ mia okulpar' leviĝos ĉi domego  
monumente,  
La domrompiĝon propran kaj malvarmon mi suferos  
senlamente!

— Du Fu

## KANTO DE SOLDATO

Malĝojon per la vino en brilanta jadpokalo  
Esperas mi dronigi, sed ekvokas bivo sur ĉevalo.  
Ne ridu, se mi dormus mortebria sur la kampo.  
Kiom da homoj hejmenvenis iam de batalo!

— Wang Han\*

---

\* Wang (*ŭang*) Han (7-8a jc): Poeto de Tang-dinastio

## POST VIA FORVETURO

Post via forveturo, mia kara,  
NE ne laboras plu sur la teksilo.  
Sopire mi similas la plenlunon,  
Malkreskas ĉiunokte jam la brilo.

— Zhang Kiuling\*

---

\* Zhang Jiuling (*ĝang ĝiŭling* 673-740): Poeto de Tang-dinastio.

## HEMENREVENO

Tre juna forvojaĝis mi kaj revenas maljuna,  
Malgraŭ la lokakeento, kun hararo griziĝinta.  
Infanoj, ne konante min, demandas kun rideto:  
“De kie venis nia kara gasto honorinda?”

— He Zhizhang\*

---

\* He Zhizhang (*he ĝiĝang*): Poeto de Tang-dinastio.



## PRINTEMPA MATENO

Dormanton eksurprizas matenhelo  
Birdkantoj ĉie eĥas de l' orelo.  
Sed dum la noktaj vent' kaj pluvo,  
Kiom da floroj ja ekkuŝis sur la tero?

— Meng Haoran\*

---

\* Meng Haoran (*meng haiĵan* 689-740): Poeto de Tang-dinastio

## ĈE LA HEĜO

Hom' nevideblas en silenta monto,  
Nur homaj voĉoj eĥas en krepusko.  
La sunrebril' penetras la densejon  
Kaj kuŝs sur la velurverda musko.

— Wang Wei\*

---

\* Wang Wei (*ŭang ŭej* 701-761): Fama poeto de Tang-dinastio, kompetenta ankaŭ en pentrado, muziko kaj kaligrafo.

## PAVILONO EN BAMBUARO

Mi sidas sola en la bambuaro,  
Sepkordon ludas kaj buŝfajfas nun.  
Tiun densejon konas ja neniuj;  
Por min prilumi venas nur la lun'.

— Wang Wei

## POEMO

Vi, kiu venis de l' naskigvilaĝo,  
Ja devas scii pri ĝia novaĵo  
Ĉu l' umearbo ĉe l' fenestro floris  
Jam en la tag' de via forvojaĝo?

— Wang Wei

# AL YUAN-ER, KIU VETURAS KOMISIITE AL ANXI<sup>1</sup>

En Weicheng<sup>2</sup> matenpluvo saturetis la stratpolvon,  
Kaj ĉe l' gastejo freŝe verdaj staras la salikoj.  
Ankoraŭ unu glason malplenigu, mi vin petas,  
Trans Yangguan<sup>3</sup> okcidente ne troviĝos jam amikoj!

— Wang Wei

---

1. Anxi (*anŝji*): En nuna Xinjiang (ŝinĝĵang)-a Ujgura Aŭtonoma Regiono.

2. Weicheng (*ŭejĉeng*): Urbo ne malproksime de Chang'an, la ĉefurbo de Tang-dinastio.

3. Yangguan (*jangĝuan*): Tiama landlima pasejo, en la nuna Xinliang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono.

## LA LASTA NOKTO DE L' JARO

Ĉe lamp' sidante, mi sendormas en hotelo,  
Jen nekonata sent' pezigas koron mian  
Ho! Transe mia hejmolando, je milmejlo;  
Kaj morgau nega har' indikos jaron plian!

— Gao Shi\*

---

\* Gao Shi (*gāo shì* 702-765): Poeto de Tang-dinastio.

## HEJMENREVENO EN MALFRUA PRINTEMPO

Mutas la orioĵoj. Estas la printemp' en sveno.  
Post magnoliaj, la migdalaj floroj en ĝardeno  
Disflirtas. Mi ekamas la bambuojn ĉe l' fenestro,  
Kiu konservis sian ombron por mia reveno.

— Qian Qi\*

---

\* Qian Qi (*ĉjan ĉji* 722-780): Poeto de Tang-dinastio.

## PRINTEMPA MALĜOJO

Forpelu jam la oriolon,  
Ke ĝi ne trilu sur la branĉo.  
De l' tril' rompiĝos mia songo  
Kaj ne ĝisvenos al la fianĉo.

— Jin Changxu\*

---

\* Jin Changxu (ĝin ĉangŝju): Poeto de Tang-dinastio.



## EN ARMEO ĈE LANDLIMO

Sur Ĉiel'-mont' marvento blovas froste post la neĝo,  
Fluto ekludas pri "Malfacileco de vojaĝo",  
Da militistoj tricent miloj en dezerto sabla  
Ekturnas ĉiuj sian kapon en luna pejzaĝo.

— Li Yi\*

---

\* Li YI (li ji 748-827): Poeto de Tang-dinastio.

# RIGARDO AL LA TRITIKA

## RIKOLTO

Kampistoj tutan jaron okupiĝas,  
Estas duoble tiel somermeze.  
Kiam ekblovas nokte suda vento  
Kaj ora gren' sur kampoj pendas peze,  
Patrinoj kaj edzinoj portas korbojn  
Kun mang' kaj akvokruĉojn la infanoj  
Al la suda altaĵo por siaj tie  
Penege laborantaj viraj anoj.  
Iliajn dorsojn rostas fajra suno  
Kaj la piedojn bakas spiro tera.  
Eĉ elĉerpitaj ili ne murmuras  
Kontraŭ la longa labortag' somera.  
Apude kun infano en la sino,  
Staras malriĉulino el vilaĝo,

En dekstra mano delasitaj spikoj  
Kaj sur maldekstra brako la korbaĉo.  
Plenigas la animojn per malĝojo,  
Ŝia kortuŝa trista rakontado.  
“Havaĵo konsumiĝis de impostoj  
Nun mi kolektas tion pro malsato.”  
Kian meriton havas mi, ke tricent  
Dan’ojn<sup>1</sup> mi nun ricevas jar-enspeze.  
Ne terkulturas, nek silkvermojn bredas,  
Sed grenon havas mi pli ol necese.  
Mi kun sekreta honto en la koro  
Ne povas peli tion el memoro.

— Bai Juyi<sup>2</sup>

- 
1. Dan estas mezur-unuo de greno kaj similaj. Ĝi egalas 150 ĝinojn aŭ 75 kg.
  2. Bai Juyi (*baj ĝjuji* 772-846): Fama poeto de Tang-dinastio. Liaj poemoj kun populara lingvo spegulas la mizeran vivon de tiama popolo.

## MALJUNA LIGNOKARBISTO

Vendist' de lignokarbo  
Okupas sin je faligado kaj bruligo de montarboj.  
Lian vizaĝon kovras fulg' kaj polvo jam de jaroj.  
Nigras la fingroj kaj griziĝis la tempioharoj.  
Vestaĵo kaj nutraĵo por la tuta domo, ĉio  
Dependas de l' forvendo de l' malmulte-kostaj varoj.  
Li havis sur la korpo nur vestaĵon tre maldikan,  
Sed ol la malkariĝon de la karb', li froston pikan  
Preferas. Nokte densa neĝo kovris la kamparon,  
Matene tra l' glaci' kondukas li la karboĉaron.  
La bov' laciĝas, hom' malsatas kaj la sun' jam altas.  
Ekster la Sudpordego, sur la kota strat' li haltas.  
Jen du rajdantoj algalopas: eunuko mezranga  
En flava robo kaj malantaŭ li sekvant' en blanka.  
Skribaĵo en la mano kaj je l' nom' de l' suvereno  
Ordonas li, ke l' bov' la ĉaron al nordo trenu.  
Pli ol mil ĝinojn pezas la ĉarplen' da karb', sed devas  
Obei la oldulo malgraŭ sia grandĉagreno.  
Dek futoj da silkaĵo kaj skarлата muslinpeco  
Ligitaj al la bova kapo — jen pago de la prezo!

— Bai Juyi

## KULTURADO DE LIÇIO

Skarlataj fruktoj sur la branĉoj estas ŝatindegaj,  
Sed la prefekto blankbarba iom tro malsaĝa.  
Kiu ĝisvivos ilin ĝui post dek jaroj? Tamen  
Kulturas liĉiujon en la kort' la hom' grandaĝa.

— Bai Juyi

# RIVERO SUB VESPERA

## KREPUSKO

Strio de Sunrebrilo sternas sin en la rivero,  
Kie duone fluas fajro, duone hidrargo.  
Sorĉa vesper' de l' tria tago de l' naŭa monato,  
Kiam rosgutoj ŝajnas perloj kaj la Lun'pafarko.

— Bai Juyi

## PRI TERLABORISTOJ

### I

Printempe oni semas unu grajnon,  
Dekmil rikoltas en aŭtun', de l' ŝpato  
Nenie estas col' da tero virga,  
Kampuloj tamen mortas de malsato!

### II

Ŝvito faladas teren, kiam oni  
Sub brula suno sarke flegas grenon.  
Kiu ja scias, ke en lia bovlo  
Ĉiu grajneto kostas grandan penon!

— Li Shen\*

---

\* Li Shen (*li ŝen* 8-9-a jc.): Poeto de Tang-dinastio.

## KANTO

Printempa fluo frapas kontraŭ l' montpiedo,  
Kaj supre pompas ĉiu ruĝa persikfloro:  
La floroj baldaŭ velkos, kiel via amo,  
Fluo senfinas kiel mia kordoloro!

— Liu Yuxi\*

---

\* Liu Yuxi (*liǔ yùxī* 8-9-a jc.): Poeto de Tang-dinastio.



## KANTO DE VAGANTA FILO

Per la faden' en la patrina mano  
Kudriĝis la surkorpa fila vesto.  
Ĉe l' ekforir' ŝi dense dense stebis  
Pro timo, ke longdaŭrus la forresto.  
Kiel herbet' repagu per dankemo  
La sunan varmon de l' printempa festo!

— Meng Jiao\*

---

\* Meng Jiao (*meng ĝjaŭ* 751-814): Poeto de Tang-dinastio.

## MALĜOJA KANTO

Verŝu aparte mian larmon

Kaj vian en laĝeton, kara !

Vidu: por kiu el ni mortos

La lotusflor' ĉi-tiu-jara.

— Meng Jiao

# VIZITO AL AMIKA

## KAMPDOMO

Trans Fengshui<sup>1</sup>-pont' vojet' zigzagas al la okcidento.

Kliniĝis jam la sun', sed kie ja via tegmento?

Similas en vilaĝoj ĉiuj pordoj kaj stratetoj

Kun neĝe-floraj dorn-arbetoj en printempa vento.

— Yong Tao<sup>2</sup>

---

1. Fengshui (*fengshui*): Rivero en Hunan-provinco.

2. Tong Tao (*jong tao* 805-?): Poeto de Tang-dinastio.

## FIDELA EDZINO

Vi scias bone, ke mi havas edzon,  
Tamen vi perloparon al mi sendas.  
Min tuŝas via korsento tenera,  
Kaj ĝi sur mia vest' ruĝsilka pendas.  
Mia kastelo alta staras apud reĝa parko,  
La nobla edzo estas gvardiisto ĉe l' monarko.  
Mi kredas: via koro puras kiel suno hela,  
Sed al la edzo mi ja ĵuris ĝismorte fidela.  
La perloparon mi redonas, ve! kun larm' de malfeliĉo,  
Kial ni ne nin vidis antaŭ mia edziniĝo!

— Zhang Ji\*

---

\* Zhang Ji (*ĝang ĝji* 8-9-a jc.): Poeto de Tang-dinastio.

# TERKULTURISTO SUR LA MONTO

Povra maljuna kamparano sur dezerta monto  
Kulturas terpeceton. Aĉe vivas li malsata  
Pro la rikolt' mizera kaj imposto peza, tamen  
La greno rubamase putras en tenejo ŝtata.  
Kiam la ŝpato kuŝas vintre en la dom' malplena,  
Glanojn kolektas li kun sia filo piedvage.  
Dume en ŝip' de riĉa komercisto vojaĝanta  
Hundeton oni nutras per viando ĉiutage.

— Zhang Ji

## DISTRIKTO DE NACIA MINORITATO EN LA SUDO

River' miasma kuras tra ravinoj kaj la homoj  
Plejparte nestas sin en la surfostaj bambudomoj.  
Urbmuro ne troviĝas sur la apudmaraj montoj  
Krom pin-tabulo kun surskribo 'Xiangzhou'\* , la  
lokonomo.

— Zhang Ji

---

\* Xiangzhou (*ŝjangĝou*): En la unua Guangxi (*gŭangŝji*)-a Ĝuang-nacieca Aŭtonoma Regiono.

# LA DISTRIKTESTRO DE YANMEN<sup>1</sup>

Disfalus la remparo sub la pez' de l' nubamaso.  
Kontraŭ l' sunflamo kiel skvamoj flagras la kiraso.  
Aŭtuna firmament' resonas de blovado korna,  
Kaj la limlando dronas en vesper-purpuro morna.  
Marĉo al Yishui<sup>2</sup> kun duonvolvita ruĝa flago.  
Frostego. Dika prujno. Raŭkas la tambura krako.  
Pro la donata al mi en via korteg' favoro,  
Spado en man' mi paŝas al la morto kun bonvolo.

— Li He<sup>3</sup>

- 
1. La Distriktestro de Yanmen (*janmen*): La poeto prunteprenis la titolon de malnova kanto por kanti pri imagita heroo militisto.
  2. Yishui (*jiŝui*): Rivero en la nuna Hebei-provinco.
  3. Li He (791-817): Poeto de Tang-dinastio.

## PRINTEMPO EN SUDLANDO

Eĥas birdotrilad' tra mar' de ruĝo kaj verdaĵo  
Kaj flirtas de mont-antaŭurbo aŭ akvovilaĝo  
Vinflagoj<sup>1</sup>. Kvarcent okdek temploj el Sud-dinastioj  
Siluetiĝas en pluvonebul' kvazaŭ miraĝo.

— Du Mu<sup>2</sup>

- 
1. Vilaĝa drinkejoj ofte hisas flageton kiel signon.
  2. Du Mu (803-852): Fama poeto de Tang-dinastio.



## VETURO SUR MONTO

Foren kondukas sur aŭtuna monto vojoj ŝtonaj,

Sub leviĝanta nuboj kaŝas sin loĝejoj homaj.

Halto de acerar' pro ĝia ĉarm' en sunrebrilo,

Ties folioj ruĝas pli ol floroj frusezonaj.

## SENDI AL SIA EDZINO EN PLUVA NOKTO

Ĉu difinita dato hejmenira? Ne, ankoraŭ ne.

Sur Bashan<sup>1</sup>, la lago ŝvelas pro la nokta pluv' aŭtune.

Kiam ĉe l' fenestro okcidenta en kandela lum',

Pri l' tempo de la nokta pluv' sur Bashan ni babilu

kune!

— Li Shangyin<sup>2</sup>

- 
1. Bashan (*bašan*): Nomo de monto en la nuna Sichuan-provinco.
  2. Li Shangyin (*li ŝangjin* 812-858): Poeto de Tang-dinastio.

## SKRIBITA SUR VILAĜA DOMO

Lastjare en ĉi pord', la saman tagon en precizo,  
Rozvangoj kun persikflor' konkuris sub brizkiso.  
Kie troviĝas nun, ho, la rozvangoj? Mi ne scias.  
Nur persikfloroj ridas same en printempa brizo!

— Cui Hu\*

---

\* Cui Hu (*cuj hu*): Poeto de Tang-dinastio.

## ĈE LA FRONTO

Nokta batalo sur Sanggan-rivero:  
Multaj soldatoj iris senrevene.  
Alvenas vintraj vestoj kun letero  
Ankoraŭ el la hejmo ĉi-matene!

— Xu Hun\*

---

\* Xu Hun (*ŝju hun* 9-a jc.): Poeto de Tang-dinastio.

## KANTO

La deksepan de l' monato kvara  
(ĝi estas la hodiaŭa tag' lastjara),  
kiam vi foriris,  
larmon retenante mi kapklinis,  
kaj honteme brovojn mi kuntiris.

Mia koro sangas en silento;  
nur la sonĝo vin postsekvis nun!  
Tion ja neniuj sciis, krom la  
surĉiela lun'.

— Wei Zhuang\*

---

\* Wei Zhuang (*ŭej ĝŭang* 836-910): Poeto de Tang-dinastio.

# Modernaj Poemoj

## LUMMARO

La universo senlima  
Fariĝis mar' de lumo.  
Ĉie lumondo de la vivo,  
Kaj ĉie estas freŝa junco,  
Ĉie estas poezio,  
Ĉie estas rid' en kuno:  
Ridas la maro,  
Ridas la monto,  
Ridas la tero,  
Ridas la suno,  
Mi kaj A-ho, mia eta ido,  
Ridas kune en la rido.

La verdaj pinoj kvazaŭ el smeraldo,  
Ridante, per mansigno vokas nin,  
Kaj la ebena de arĝenta sablo,  
Ridante, al brakumo logas nin.  
Tien ĉi ni venas,  
Venu ankaŭ la brakumo.  
Sur via brusto ni deziras  
Nin bani en la lumo.  
Amas' da lernejoj knabetoj  
Petolas kun salt' kapreola;  
Jen unu alĵetas plenmanon da sablo,  
Respondas alia per rido sonora;  
Jen unu renversas alian kubute,

Tuj lin mem faligas ekbato surkola:  
Revenas mi al la malnova tempo karmemora.

Malnova tempo antaŭ dekkvin jaroj;  
Mi estis tiam nur infan',  
Mi vivis sur Qingyijiang<sup>1</sup>, en Jiazhou<sup>2</sup>,  
Kaj lernis en lernejo apud Zhileshan<sup>3</sup>,  
Mia patrin-lernejo apudmonta!  
Tiu sablej' en via sin', mia lulilo,  
Ĉu ankoraŭ tiel plenas de glori-brilo?  
Iam mi havis tre amatan kamaradon,  
Kiu mortis en ĉi jar' laŭ onidiro.

Mia intima kor-amiko,  
Via figur' gracia kiel junko kaj saliko  
Ankoraŭ ŝvebas antaŭ mia kor-okulo,  
Ĉu ankaŭ la anim' liberigita  
Apud mi ĝoje ridas en la or-nebulo?  
Kaj dum spirito disiĝis de l' korpo,  
Ekmemorante pri via amiko transmara  
Kiom vi verŝis da larmoj amaraj?

Ha, tie svelta lumotur' el ŝtono  
La maron jam prilumas.  
A-ho deziras ĝin surgrimpi,

---

1. Qingyijiang (*ĉingjiĝjang*): Nomo de rivero.

2. Jiazhou (*ĝjaĝou*): Nomo de loko.

3. Zhileshan (*ĝileŝan*): Nomo de monto.



Tuj lian volon mi plenumas.  
Ha, montoj kvazaŭ brulas,  
Arĝentaj ondoj lulas  
Kaj la velŝipoj opaj  
Kvazaŭ en la spegulo kuras,  
En la spegulo ankaŭ blankaj nuboj kuras kune:  
Jen la portreto de la vivo, ĉu ne?

A-ho, kie estas la ĉielo?  
Li montras al la superkapa bluo.  
A-ho, kie estas nia tero?  
Li montras al insuloj en marfluo.  
Kie estas paĉjo?  
Li montras al fluganta birdo en aero.

Hejho, mi estas birdo en aero.  
Mi estas birdo en aero.  
Kun blankaj nuboj mi vetflugos,  
Kun helaj veloj mi vetkuros:  
Ho! kiu el ni ja pli alte flugos?  
Kaj kiu el ni pli rapide kuros?

— Guo Moruo<sup>4</sup>

---

4. Guo Moruo (*gŭo moĵuo* 1892-1978): Eminentia literaturisto kaj poeto de Ĉinio. Liaj poemaro “Diino”, historiaj dramoj “Qu Yuan (*ĉju jŭan*)”, “Cai Wenji (*ĉaj ŭengji*)” k.a. estas famekonataj.

## POSTPLUVA LUNO

Arbaron apudmaran  
Banas mistera pala helo,  
En la arbar' silenta  
Ankoraŭ gutas freŝa pluvo de l' vespero.

Popla aleo kvazaŭ glime pavimita  
Antaŭ mi etendiĝas spegulgate  
Kaj min kondukas al marbord' kvieta,  
Jen kaj jen parfumblov' min kisas flate.

Mi malvarmeton sentas korpe,  
Kaj vi envolvas vin en nubmantelo,  
Ho, plena hela luno,  
Alpruntu vian blankan veston de anĝelo.

Miajn okulojn fuĝas dormo,  
Kaj vi vin kaŝas en nebul-kurteno,  
Ho, stela mar' senbrua,  
Min akompanu per muziko de sireno.

— Guo Moruo

# NOKTOKANTO DE MISANTROPO

Senborda ĉielmaro,  
Hidrarga vezikaro,  
Supre ondetas la stelflu',  
Malsupre la fluid-kristalo.  
Nun por vivantoj ĉiaj la dormhor.  
En blanka pelto el pavplum',  
Malproksime, malproksime,  
Kapleve, sur ebura ŝipo staras mi en solo.

Ol vivi kiel perlon-plora marvirino,  
En la malhela fund' vegeti laŭ destino,  
Prefere kiel fala stel'  
Formorti kune al 'Senfino',  
Trenante lumogarbon efemeran,  
En la sonĝeca hela mondo.  
Iru, iru ĉiam plue  
Sub gvido de la antaŭ vi brilanta luna rondo.

— Guo Moruo

## EL "BOTELO"

XXXI

Freneza maro mi fariĝas nun,  
Tamen ŝi ĉiam restas la serena lun' ;  
Sendube estas ŝi en mia sino,  
Tamen ŝi alte pendas sur ĉiela blu',  
Senĉese mi etendas manojn por ŝin kapti,  
Tamen estiĝas nur malĝoja kava bru'.

— Guo Moruo

## STARANTA AKVO

Jen kanaletoj de starakvo senespera,  
Eĉ ne sulkiĝas la supraĵ' en freŝa brizo,  
Prefere ĵetu en ĝin fer- kaj kupro-rubon  
Aŭ mangrestaĵon verŝu ni de sup' kaj rizo.

Verdiĝus la kupraĵoj kvazaŭ el smeraldo,  
Rust' sur laduoj aperigus persikflorojn.  
Grasaj makuloj teksu el ĝi belan ŝtofon  
Kaj ŝimo sur ĝi por ĉielajn kolorojn.

Fariĝu la staranta akvo vino verda  
Neĝe kovrita de perlanta ŝaŭmo blanka:  
Kun rid' perletoj kolektigas en perlegon,  
Sed rompas jam ĝin vinoŝtela kul' stri-flanka.

Tiel staranta akvo senespera ankaŭ  
Povas sin flati per ioma bel' brilanta:  
Se iu rano ne elportas la silenton,  
Do tion konsideru ĝia voĉo kanta.

Jen kanaletoj de starakvo senespera:  
Aĉan loĝejon tian Belo nepre neos.  
Pli bone lasu al Malbel' ĝin prilabori,  
Kaj vidu, kian ĝi mirindan mondon kreos.

— Wen Yiduo\*

---

\* Wen Yiduo (*ŝen jidŭo* 1899-1946): Fama ĉina poeto kaj profesoro studanta klasika literaturon. Antaŭ la Liberiĝo de Ĉinio li partoprenis en patriota demokratia movado kaj estis murdita de sekretaj agentoj de Kuomintango.

## EBLE

(Funebra Kanto)

Eble vi vere trolaciĝas de plorado,  
Eble, vi eble volas iom kuŝripozi,  
Do mi ordonos, ke l' ardeo ne tusadu,  
Rano ne kvaku, kaj vesperto ĉesu krozi,

Ke la palpebrojn ne penetru sunradioj  
Kaj viajn brovojn spiro de zefir' ne kombu;  
Mi petos montnimfojn vin prizorgi garde  
Ke la lulsorĉon ĉirkaŭ vi neniu rompu.

Vi aŭdus, ke lumbriko humon turnas supren,  
Kaj ke subteraj herbradikoj akvon suĉas.  
Eble vi trovus ĉion ĉi muzik' pli bela  
Ol homa voĉo malbenema, kiu muĝas.

Vin mi tuj lasos dormi, mi tuj lasos dormi,  
Simple fermiĝu via okulpar' senvide,  
Mi milde, milde kovros vin per flava tero  
Kaj petos papercindron\* flugi malrapide.

— Wen Yiduo

---

\* Oni bruligas kutime en tombejo ŝajnan monon el papero por la mortintoj.

## RIVERETO

Arbombro plumbe pala —  
Longa poem' koŝmara —  
Prempezas sur la brusto  
De flu' sub dormkateno,  
La flu' baraktas kaj baraktas,  
Sed ŝajnas vana peno.

— Wen Yiduo



# KANTETO DE FALANTA

## FOLIO

Aŭdiĝas sur la trotuar' paŝbru',  
Proksimas jam la sonĝolando; ĉu  
Estas la ŝia? Certe ja, mi pensas,  
En tia noktmalfru' !

Sur la fenestro jen iu frapetas.  
(Mi jam tuj apud la sonĝolando estas:)  
Certe ŝi volas min surprizi,... vidu,  
Mi tamen kvieta restas.

Ĉe la litkapo eksusuro krepa,  
Mi diras (duondorma, duonreva:)  
“Neniam vi komprenos min, do kial  
Igadi min korkreva!”

Ĝemspiro ĉe la kapkusen' murmuras,

(La sonĝolanda sorĉo min eklulas:)  
“Mi vin neglektis!” kaj de ŝiaj larmoj  
Jam vangoj miaj brulas.

Je l’ voĉo ĉagreniĝas mia koro,  
(folioj dancas en la kort’ en ĥoro:)  
Finiĝas sonĝo; kaj la ĉagrenanto...  
Nur la aŭtuna ploro!

— Xu Zhimo\*

---

\* Xu Zhi mo (*ŝju ĝimo* 1896-1931): Ĉina poeto. Li iam instruis en Beijing(*bejĝing*)- kaj Qinghua(*ĉinghŭa*)-universitatoj. En 1926 li estis la ĉefredaktoro de la revuo “Novluno”. Inter liaj verkoj troviĝas “Poemaro de Xu Zhimo”.

## LI TIMAS, KE ONI ELDIROS

(Amiko, mi komprenas, tiu gena osto,  
Netolerebla, ĉu ne? ...gorĝo kompatinda! )  
“Vidu, sur la herbero kaŭras jen lokusto:  
Vent’ inter pinoj fajfas kiel liuto tinta.”

(Amik’, okuloj viaj, mi ja vidas klare.  
Trembrilas de kristalaj larmoj el la koro:)  
“Vidu, du papilioj tie flirtas pare,  
Kaj flaru la odoron dolĉan de l’ violo! ”

(Amiko, via koro batas maltrankvile,  
Sed, sciu, mia ja ne estas pli kvieta:)  
“Vidu, jen paro de ge-ĉielarkoj\* brile  
Montras sin sur zenito,... tre koketa.”

(Ne estas ŝerco, ja pli bonas ne eldiri,  
Vian animsekreton povas mi trasenti:  
Mortvundos tiu vort', vi devas konsideri,  
Do kial riski blinde kaj ĝin poste penti!)

(Ĉar mi ne volas, ke suferu vi en flam',  
Ankaŭ mi... ankaŭ mi mem ne suferi volas.)

“Vidu, la ĉielarkoj nun disfluis jam,  
Kaj ne plu papilioj sur herbej' petolas.”

(Retenu vin! la Belo... nur burgon' tenera,  
Kiam ĝin malheligi per nuanc' de zorgo?)

“Ni iru, jam mallumas la ĉiel' vespera,—  
Por vidi la matenruĝon ni revenos morgaŭ.”

— Xu Zhimo

---

Laŭ cina popolkredo, ĉielarko estas vira aŭ ina.

## AL KIU?...

Al kiu direktiĝu, ho ve, la vana plendo  
Kontraŭ la temp' petola,  
Ke en la frosta nokto blovas plora vento  
Sur ŝia tomb'izola?

“Vi devas garde stari kun atento konstanta  
Ĉe l' fluo gaje brua,  
Neniam preterpasu senzorge promenanta  
Ruĝa fiŝet' aŭ blua.”

Apud oreloj miaj senvorta flustro fluas  
Spirblove tra l' silento,  
Kiel aŭtuna monto en la nebul' fluktuas  
Antaŭ matena vento.

Tial mi spasme tenas la ŝnuron de l' vivreto  
Kiel fiŝist' sur gardo,  
Al la tempflu' senfina gapas kaj en sekreto  
Esperas pri fiŝsalto.

Kaj nun, nun restas simple la retĉifono jena —  
Moko pri la esperoj,  
Spirpene mi sopiras je l' tempo senrevena

Kaj dronas en larmeroj.

En la malluma nokto jen mi tutsole migras,  
En nokto malĝojkova:  
Fantome en stellumo nur mia ombro nigras  
Apud la tombo nova.

A1 kiu... Sed mi timas per la vekrio ĝeni  
Tiun kvieton pian;  
Kliniĝas kaj etendas manojn por ĉirkaŭpreni,  
Ho, freŝan tombon ŝian.

Morna kampar' ne havas limon, nur en la foro  
Vilaĝaj lampoj flagras.  
En la arbaro densa jen vagas mi en solo,  
Dum strig-disputoj akras.

Malluma nokt' profunda la teron ĉirkaŭvolvas  
Kaj kovras vin kaj min.  
Vi dormas sub la tero kviete, dum mi orfas  
Vage en halucin'.

Mi volas, ke aŭroro ne venu ĝustahore  
De l' griza oriento,  
Apud la kara tombo por ĉiam mi restadu sole  
Kaj velku en silento.

Tamen la sun' aperas jam de l' ĉiela rando,  
Ĝus vekiĝintaj birdoj

Ĉie en la arbaro bruadas kun ĝojkanto:  
Ree matena bildo.

Baldaŭ rigora vintro forpasos kaj aprila  
Brizo alportos verdon,  
Ankaŭ ne mankos floroj kiel ornamo brila  
Por kovri la tombverton.

Sed ĉar vi, mia kara, devas eterne dormi  
Sub senkompata tero,  
Nek tagon nek printempon mi nun esperas, por mi —  
Nur la nokto-malhelo.

— Xu Zhimo

## ŜI DORMAS

Kiam ŝi dormas —  
Ĉastblanka lotusfloro kliniĝinta en stellumo:  
Kiam ŝi songas —  
El incensilo serpentumas stri' de blua fumo.

Ŝi dormas bone —  
La bruan liran kordon superzumas akva gamo;  
Ŝi jam ensongas —  
Blankaj kaj verdaj papilioj en flugila amo.

Spirad' egala:  
Ĝia arom' saturas la aeron ĉirkaŭantan;  
Aer' beata  
Brakumas kaj karesas la figuron elegantan.

Luksema tempo!  
Kiel marego kun orsabloj disaj, la kvieto  
Kuŝas senlima —  
Luliĝas inter la ondkvamoj brila boateto.

Vido korrava:  
En multkolora vest', drinkinte el la vin' miela,  
Kun hederbranĉo



Jam dancos mi ekstaze en garden' vinbera.

Ho, kiel bela !

Printempa farbo floras sur vizaĝo ŝia dolĉa,

Freŝa kaj ĉarma

Kiel rozfloro kaj narciso en sunlumo sorĉa.

Mister' songlanda

Tikletas ŝian koron — ho, animo senmakula —

Kiel abelo

Senĝene kaj maldece flirtas en florkap' velura.

Songbildo virga.

Silentu, ne malhelpu la songdion dum laboro,

Kiu fadenojn

Tiras el vesperruĝo kaj arĝento kaj sun-oro.

Oran navedon

La neĝaj manoj tien reen ŝovas kun konscio,

Kaj fe-palacon

Kun kant' kaj danco de anĝelo kreas per magio.

Ĉarma ridkavo

Klarigas la ensonĝan ĝojon de la virga juno,

Kiel rosguto

Trembrilas sur lotusfolio en matena suno.

— Xu Zhimo

## EN VAGONARO

En vagonaro estas homoj de diversaj stato: :  
Junuloj, maljunuloj, komercistoj kaj soldatoj;  
Kaj en diversaj pozoj: jen kuŝantaj aŭ sidantaj,  
Dormantaj aŭ vekitaj, en mallumon rigardantaj.

Konfuzan ritmon la radar' martelas sur la reloj,  
Sur tuta vojo sen lamplumo, sur ciel' sen steloj,  
Nur vagonlampo pala super la vizaĝoj pendas,  
Maljunaj, junaj, ĉiuj pri l' vojaĝ' laciga plendas.

Subite kanto fluas el angulo plej malhela,  
Kiel montflu' aŭ matenbird' arĝenta kaj miela,  
Kaj kiel torĉo ĝisĉiela en dezert' senlima,  
Kiu lumsagojn pafas al montvalo malproksima.

Estas infano, kiu laŭte kantas kun vivĝojo,  
En la krepuska tempo kaj sur la malluma vojo,  
Ŝi kantas kiel torentanta flu' kaj bird' matena  
Ĝis tutvagono de muziko rava estas plena.

La pasaĝeroj unu post alia ege miras,  
Sed poste jam vizaĝoj ĉiuj de admiro brilas:  
Soldatoj, komercistoj. maljunuloj kaj junuloj,  
Eĉ de la suĉinfanoj malfermiĝas la okuloj.

Ŝi kantas ĝis la tuta vojo helas sub lamphoroj  
Kaj sur la nubpavimo lun' kun steloj paŝas digne,  
Kiel festonoj vetkoketas la surbranĉaj floroj,  
Kaj ĉe herbtigoj etaj jam lampiroj flirtas cigne.

— Xu Zhimo

## MARISTO

Luno sur la ĉielo,  
Kaj ŝipo sur la mar',  
Li sidas en mallumo apud direktilo  
Kaj la vizaĝon kovras per manpar'.  
Li timas, ke la luna palpebrumo  
Kaj la ŝvelo de ondar'  
La rigardon logus al la hejmolando  
Ĉe l' tuŝiĝo de ĉiel' ka i mar':

Sed ekvizitas antaŭ li:  
Apud la puto, kie granatarbo flamas de florar'.  
La karulin' starigas bambustangojn  
Por sekigi sian bluan veston el perkal'.

— Liu Yanling (*liŭ janling*)

# KANTO PRI POSTRESTANTA

## FOLIO

Li

Rigardu, la foli' malseka de pluvgutoj

Sur ĝia branĉo pendas birde,

(La eta kor' malseka de larmeroj

Al via koro premas milde.)

Ĝi ŝanceliĝas pro la tim', ke vento

Blovus ĝin al la fora firmamento.

Ŝi

Rigardu, la birdeto amis la folion febre,

Sed nun ĝi jam formigros netroveble.

(Simila al folio estas mia kor',

Kaj vi, ŝtonkor', jam iros for.)

Malgaje ĝi atendas la ventosusuron,  
Per kiu ĝi pretendas sekvi la karulon.

Li

Vi estas do la folieto kaj mi la ventspiro,  
Mi amis vin sur branĉ', kaj ankaŭ dum vojiro.

Ŝi

Venu, ekblovu, jam ekblovu, vent' galanta,  
Mi donas al vi mian vivon de foli' restanta.

— Dai Wangshu (*daj ŭangŝu*)

## SABLERO

Kiel sablero vi vagflugas laŭ ventporto,  
Mem ne sciante kien vi veturos for;  
Forgesu, ke al vi ankoraŭ restas forto,  
Kaj ne parolu pri la celo en la kor’.

Ekde tagiĝo vi veturas laŭ ventpelo  
Ĝis nigran ombron ĵetas ĉie la vesper’.  
Nun nevideblas sur ĉiel’ eĉ unu stelo,  
Vi povas ripozeti kroĉe al herber’.

— Zang Kejia\*

---

\* Zang Kejia (*zang ke ĝja* 1905-): Fama poeto de Ĉinio kaj ĉefredaktoro de la gazeto “Poezio”. Jam estas eldonitaj liaj verkoj “Brulsigno”, “Elektitaj Poemoj de Zang Kejia” k.a.

## AMVENDISTINO

Naturdotita de krurparo facilmova,  
Kiel zefiro tien reen ŝi flugilas,  
Parfuma brizo ŝvebas de la vestangulo,  
Kaj ĉie floroj sur tapiŝ', de amo brilas.  
(Pri sia lac' eĉ unu vorton ŝi ne diras.)

Scipovas ŝi mirinde per parolo lerta  
Tian amaran ĝojon al la gast' distili,  
Kaj ankaŭ scias kun senvorta okulumo  
La homan koron per tavolo' miela ŝmiri.  
(Sian internon ŝi neniam emas diri.)

Ruĝa kaj verda vinoj  
Elsorĉas al ŝi printemp-floron sur la vango;



Pli ebriiĝas laodoro karna ol la vino,  
Kaj ŝia juno arde flamas en la sango.  
(Kiel rapidas juno, ŝi ne pensas pro tempmanko.)

Precipe taŭgas ŝia voĉo por kantado,  
Sono post sono frapas vin sur la kor-pordo.  
Ĝojon, malĝojon, ĉion ajn ŝi povas kanti,  
Eldiru nur deziron vian de la hor' do,  
(Sed ŝi neniam kantas pri la propra sorto.)

Jen sur ŝi sola pezas la dezerta nokto,  
Prilumas orfa lampo la kvar nudajn murojn.  
Ekhelas dekomence ĉiu rememor',  
Ŝi, ĝeme suspirante, fermas la okulojn.  
(En universo kvazaŭ vivus ŝi en sol' .)

— Zang Kejia

## KARBOFOSISTOJ

Jen ŝakto nigra kiu teruras eĉ diablon,  
Sed strange, tie vivas ja homoj ĉion spite.  
Antaŭ eniro oni kun fingra marko klara  
Sur sia vivkontrakto subskribis ‘Konsentite’.

Suno kaj lun’ neniam vizitas tiun lokon,  
Tago kaj nokto ŝajnas sola faden’ senfina,  
La vivo celas nur al batalo kun la karbo:  
De kiam ja naskiĝis tia malam’ obstina?

Al nokta firmamento similas la vizaĝo,  
Sur kiu laktovojon desegnas ŝvita fluo,  
Kaj la okula paro fosforan lumon ĵetas  
Kvazaŭ sur la ĉiela abismo luna duo.

Prizorgi ne bezonas kiel pasigi tempon,  
La koro ĉesus bati je kiu ajn sekundo:  
Diabl’ elfrapus el la rokoj inferan fajron,  
Kaj el la tero ŝprucus mistera ekinundo.

La ombron de la Morto ili neniel timas,  
Sed ŝercas ofte per la sorto de kamarado,  
Ĉiam en babilado pensio la postmorta

Kunigas kun ilia famili-vivtenado.

Sed ankaŭ gajaj horoj por ili iam estas:  
Kiam soifan gorĝon priverŝas alkoholo,  
Ebriaj ili kuŝas kiel terbulo sub si,  
En la vakanta sonĝo ekpompas nigra floro.

Ne pensu: ili estas pli stultaj ol la porkoj,  
Nu, iutage grandan decidon ili faros,  
Disrompos la malluman karceron per la pugnoj,  
Kaj sur iliajn kapojn sunhela tago falos.

— Zang Kejia

## NOKTA PEJZAĜO

Formortis urba gamo  
Kiel refluo cedas al marbordo,  
Sub ĉiu griza domtegmento  
Estas animoj dormaj.

Fine kaleŝ' malnova preterpasas...

Ekster palaco laboristo  
Dormas kun kap' sur frosta ŝtono.  
Ekvekiĝante noktomeze  
Vekas li kamaradon piedbate  
Kaj diras, ke li aŭdas ploran voĉon  
Jen fore, jen proksime,  
En la ŝlosita palaco-ruino  
Aŭ sur rempar', sidejo de korvaro;  
Tiam respondo venas eĉ pli stranga,  
Ke iutage en vespero  
Li vidis ŝtonleonon verŝi larmojn...  
La nokta vento forirante kun suspiro  
Balancas velkajn herbojn sur urburo.

— He Qifang\*

—

---

\* He Qifang (*he ĉjifang* 1912-1977) : Fama poeto kaj literaturo-komentisto de Ĉinio.

## AŬTUNO

Obtuzaj frapoj de hakilo el profunda valo  
Deskuas la rospertojn de la vesto de maten'.  
Oni demetis la falcilon Satan de odor' de rizo  
Kaj per dorskorb' kolektas heĝofruktojn kun sukplena'.  
Aŭtuno vivas ĉe la kamparano.

Ĵeti en la nebulon surrivere rondan reton  
Kaj levi per ĝi ombrojn de acerfolioj bramsimile;  
Sub junktegment' kovrita de arĝenta prujno  
Jen malrapide reveturi en vesper' remile:  
Aŭtuno ludas sur la fiŝboato.

Plivastas la kamparo en la grila kanto;  
Pliklaras la river' kaj malkovriĝas ŝton'.  
Kien foriris la surbovaj flutemelodioj, flutos  
El kies truoj fluas somernoktaj varmo kaj arom' ?  
Aŭtuno songas sur palpebroj de la paŝtistino.

— He Qifang

## BUKEDO

### METITA SUR TOMBETO

La floroj kiuj floras kaj defalas en val' plej odoras,  
Plej brilas matenaj rosgutoj kiujn oni ne memoras,  
Mi diras, ke vi estas feliĉa, malgranda Lingling,  
Ĉar la flueto virga de ombroj ĉiam plej sonoras.

Vi sonĝis, ke rampaj kreskaĵoj enrigardas la fenestron  
Kaj la oraj floretoj falas sur vian hararon belan,  
Vi kortuŝiĝis de fabelado de l' tegmenta pluvo  
Kaj vi amis solecan, solecan lumon stelan.

Vi havis larmojn perle brilajn de knabino,  
Kaj ofte fluigis malĝojon sennoman kaj malbruan,  
Vi havis belajn tagojn kiuj melankoliigis  
Sed pli belan vi havas morton fruan.

— He Qifang

## ANTAŬDIRO

Tiu ĉi korbatiga tago fine venas laŭ sopiro.  
Vian paŝbruon alproksimiĝantan kiel nokta spiro  
Distingi povas mi de l' flustro inter vento kaj folioj  
Kaj de l' hufbatoj cervaj sur la muska aleo dum iro;  
Diru, ho, diru al mi per via kantvoĉo sonorila,  
Ĉu vi estas la dio de l' juneco en la antaŭdiro?

Vi certe venis de la varma sudo kiu vin karesas,  
Do diru al mi, kiel la tieaj sun' kaj lun' impresas,  
Kaj kiel pompe la printempa vent' malfermas  
ĉiujn florojn,  
Kaj la hirundoj pro l' salikoj verdaj kiel amfrenzas:  
Mi dronu okulferme en via songeca kanta voĉo,  
La dolĉon — mi samtempe kvazaŭ ĝin memoras  
kaj forgesas.

Haltu momente, haltu dum la longmigrado vojerara,  
Envenu, jen la tigrofela seĝkuseno, dio kara!  
Mi fajron faros per aŭtune kolektitaj foliaĵoj  
Kaj kantos por vi mian propran kanton ĉe la fajro knara;  
La kanta voĉo malleviĝos kaj reflamos kiel fajro  
Kaj kiel fair' rakontos pri la vivo de folio fala.  
Antau vi arbareg' senlima, lasu ciun pason pluan!  
Tie la arbojn ĉirkaŭtordas lianoboa' sinua,

Kaj ties trunkojn kovras buntaj strioj de sovaĝa besto;  
Neniu brila stel' kribriĝas tra la folidens' malbrua.  
Tie vi timigite ne kuraĝus fari duan paŝon  
Kiam orelojn frapas la resono kava de l' unua.

Ĉu vi decidus jam pluri? Do en mia akompano.  
Ĉiujn sekurajn padojn mi ja bone konas per kalkano.  
Survoje mi senĉese kantos por vi refreŝigajn kantojn,  
Kaj krome donos al vi jen kaj jen karesojn per la mano,  
Cetere povos vi rigardi fikse en okulojn miajn,  
Kiam ni perdos nian vojon sur la noktooceano.

Vi ne aŭskultas mian kanton el pasia maltrankvilo,  
Kaj je l' kortremo ne interrompiĝas via vojoiro;  
Formortas, jam formortas viaj paŝobruoj arogantaj  
Kvazaŭ en la krepuska mildo preterŝvebas la zefiro.  
Ĉu fakte tiel vi senvorte venis kaj senvorte iras,  
Ho, kara dio de l' juneco, kiel en la antaŭdiro?

— He Qifang



## FLUGA STELO

Jen falas fluga stelo  
Kaj falas kun ĝi  
La larmoj.

En la somera nokto kun ran-kvako,  
En vilaĝet' malnova  
Kiu ja, dum la fala stelo flugas,  
Per blua kvasto de harligo mason plektas,  
Kaj diras: por enteni perlon el marfundo  
Kiel amodonacon?

Memoro pri la foraj, foraj tagoj  
Kaj foraj piedbruoj sur la sablo...

La larmoj falas en la nokton  
Kiel la fala stelo en solecan lagon  
Sub folidensoj.

— Li Guangtian\*

---

\* Li Guangtian (li gǔāngtīan 1906-1968): Ĉina poeto kaj prozisto.  
Li verkis kaj kompilis poemarojn "Printempa Urbo", "Aŝma" k.c.

## DUM VOJAĜO

Jen nekonata alta muro  
Kretblanka en aŭtuna sunrebrilo.  
Melonoj pendas ruĝaj kaj palverdaj,  
Balancas grasaj rondfolioj duonflavaj.

Kvazaŭ novaĵo alsendita de amiko fora,  
Sed kiel vortavara ! nur du tri paroloj.  
La tono kaj mieno ja familiaras,  
Tamen la homo, kie estas, ho, la homo !

Du nigraj pordoj estas duonmalfermitaj.  
Mi enrigardas haste kaj silente  
Kaj iras kun pli pezaj ol antaŭe paŝoj.  
La sun' subiras, kuloj flugas kaj la korvoĵ.

— Li Guangtian

## UNUA STACIO

Iri laŭlonge de l' ferreloj,  
Iri plu kaj plu,  
Kien direkti do onies paŝojn?

Mi estas peza ŝarĝvagono,  
Iras de revoj plenŝarĝita.

Neniu konas la kvaliton de la revoj  
Escepte  
La superkapa ĉielbluo kaj la lago.

Mi scias, ke ĉe l' fino de l' ferreloj estas maro,  
Sed kio estas ĉe la fino de la maro?

Iri laŭlonge de l' ferreloj,  
Iru plu kaj plu,  
Kien direkti do onies paŝojn?

La maro estas hejmo de la fluoj,  
Ĝi estu la staci' unua de la ŝarĝvagono.

— Li Guangtian

## RETURNO AL LA NASKURBO

“La granda hundo bojas, la malgranda salte ĝojas,”\*  
Eble la voĉoj de A-Si kaj la etuloj  
Tremigas la salikon ekster la fenestro.

Kio! jam la stacio de Benniu?  
Ankoraŭ kiom da stacioj? Unu, du...

Sub la okuloj verd-rubando ĉiam glitas for kurante,  
Kaj telegrafaj stangoj preteriras tagon mezurante.

Mi ĉiam ŝatas gapi tra l' fenestro;  
Dum mia infanec' en la klasĉambro  
Mi ofte prenis blankajn nubojn por presitaj paĝoj.

Sub la okuloj verd-rubando ĉiam glitas for kurante.  
Jes, la lokomotiv' min memorigas  
Ofte pri la kaldron' de Watt.

“Rigardu, la kovrilo ekmoviĝas, frato Watt,  
Mi scias ja, ke via ventro estas plena de ruzaĵoj,  
Ne ĉiam vin ŝajnigu dorma.”

La dorm' de oĉjo Newton

Rompiĝas de falanta pomo.

“Ĉu ne brandetoj, kio flosas sur la maro,  
Kolumbo, he, Kolumbo? ”

Sub la okuloj verd-rubando ĉiam glitas for kurante.

Ĉu ne? la horizonto ekster la fenestro de l' infanoj  
Montriĝas ĉiam tiel vasta, fora.

Sub la okuloj verd-rubando ĉiam glitas for kurante,  
Kaj telegrafaj stangoj preteriras tagon mezurante.

En tiu tempo la maljuna avo min plej amis.  
La korp' de maljunulo estas kvazaŭ barometro;  
Vidu! la brovojn li kuntiras, la ĉielo malheliĝas.

Ree staci'? Do kia estas?

Memoras mi ankoraŭ: “Bona knabo,  
Alportu la malgrandan katon,  
Ke mi rigardu en okulojn ĝiajn —  
Kioma horo estas?”

— Bian Zhilin (*bjan ĝilin*)

---

\* La citaĵo estas el tre populara legolibro por infanoj.